

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)



**Pri Ago-Tago
en 10 landoj**

**Komerco per
Esperanto**

**Malpermeso
por kongreso**

Komputiloj kaj Esperanto: ĉu simbiozo?

Enhavo

- 201 Informado: Diskreskas la tradicia Ago-Tago
- 202 Virtuala realo: Cerbumo pri Esperanto kaj novaj teĥnikoj (Martin Weichert); UEA havas hejmpaĝon
- 204 Komputado: Ŝparemo estas kriterio pri belo (Sergio Pokrovskij); De "hardvaro" al ĉiesaĵo (Maŭro La Torre); Esperanto-kongrua tekstredaktilo (Duncan C. Thomson)
- 206 Fakaj asocioj: Kiuj plej praktike uzas Esperanton (Franz Josef Braun); Alvoko al ĉiuj rotarianoj
- 207 Ekstera kaj faka agado: Tridek organizoj kontaktindaj (Amri Wandel); Delegitoj de UEA: Ĉu vi jam kandidatiĝis por 1996-1998?
- 208 Eksteraj rilatoj: Esperantistoj ekzemplas multkulturan kunvivadon (Jozef Reinart)
Lingvo: PIV kaj aliaj (Antonio Valén)
Eŭrazio: Kongreso Siberia
- 209 Azio: Tri tagoj defias japanojn (Harald Schicke);
Novaj aspiroj en Vjetnamio
- 210 Fondaĵoj: Malpermeso por kongreso (Hans Bakker)
Junularo: TEJO-eroj tutmonde (Jorg De Mulder)
- 211 Literaturo: Letero al Barbara (Reinhard Haupenthal)
- 212 Recenzoj: *Unuminutaj noveloj* (Kalle Kniivilä); *Amkantoj. Cants d'amor* (Péter András Rados); *Historio de la mondlingvo. Tri jarcentoj da serĉado* (Detlev Blanke); *Ariadna fadeno* (Andy Künzli); *Language as Barrier and Bridge* (Jan Koszmaluk)
- 214 Reagoj
- 215 Laste aperis; Foliume
- 216 Loke – Fake – Persone
- 218 Oficiala informilo; Nekrologoj; Anoncetoj
- 219 Indekso 1995

Vi trovos

eble maltrafa ke nia decembra kovrilo aspektas malvarme-teknikece kaj ke ni dediĉas kvar paĝojn al komputikaj temoj (p. 202-205), kvazaŭ la 15-an de decembro ni festus ne la Tagon de la Esperanta Libro, sed la Tagon de la Esperanta Komputilo. Nu, la Librotagon ni ja salutas libre: krom la kutima kvanto de recenzoj (p. 212-13) kaj de novaj eldonaĵoj (p. 215), vidu literaturan paĝon, en kiu eldonisto Reinhard Haupenthal omaĝas al sia forpasinta eldonato kaj amiko Karolo Piĉ (p. 211).

Sed ne pensu ke komputiloj devus forĉasi librojn el nia vivo! La "iom freneza" esperantisto Moldur vidigas al vi en realisma vizio (p. 202-203) ke komputiloj kaj ties retoj havas inter siaj senfinaj kapabloj multajn utiligatajn — kaj utiligendajn — de ni, esperantistoj. Fulmrapida korespondado, tuja rezervo de tranokto ĉe ano de Pasporta Servo, eltrovo de la plej proksima E-klubo fareblas komputile . . . kaj, ĝuste, efika serĉado de librotitoloj kaj de sciindaĵoj pri verkistoj!

Havu belajn kaj feliĉajn jarfinajn festojn!

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 33; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anoncarifto (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Osmo Buller.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎+82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; ☎+82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; ✉keast@soback.kornet.nm.kr.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario (strategia planado, eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎+1-613-565-9282 [of/h]; ☎+1-613-565-9279 [of/h]; ✉mfettes@magi.com.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎+31-5284-1214 [h], +31-50-613769 [of]; ☎+31-50-613763 [of]; ✉azgiow6lfred@relay.nl.net.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio; informado): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎+370-7-739776 [h], +370-7-208242 [of]; ☎+370-7-204970 [of].

Estrarano (kongresoj, kulturo, TEJO): s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-6-39-72-61-98 [h]; ☎+39-6-39-72-61-69 [h]; ✉mc8750@mlink.it.

Estrarano (faka kaj scienca agado): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎+972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ☎+972-2-658-4437 [of]; ✉amri@vms.huji.ac.il.

Diskreskas la tradicia Ago-Tago

El 19 urboj de 10 landoj ni ricevis ĝis nun sciigon pri loka Ago-Tago: rekorda cifero, kiu konfirmas la tradiĉiĝon de ĉi tiu informada iniciato. Ĉi-jare ankaŭ du estraranoj, Michela Lipari kaj Renée Triolle, mem kunagis loka la 7-an de oktobro.

Brazilo: Ago-Monato

En la ĉefurbo Braziljo la Ago-Tago iĝis ... Ago-Monato! La 13-an de sept. la deputitoj de la federacia distrikto Braziljo preskaŭ unuanime voĉdonis por leĝo laŭgrade enkondukanta E-on en la elementajn kaj mezgradajn lernejojn de la ĉefurbo.

Dum Monda Kongreso de Spiritismo kun ĉ. 2700 adeptoj (1-5 okt., Braziljo) unu el la kongreslingvoj estis Esperanto, kaj la stando de Brazilia E-Ligo vendis sian tutan stokon de lerniloj kaj vortaroj.

En la Ago-Tago mem 200 homoj aŭskultis prelegon de prof. José Passini pri la monda komunik-problemo kaj ties solvo. (G. Grattapaglia)

Finnlando: Versoj gravuritaj

Okaze de la Aŭtunaj Tagoj de E-Asocio de Finnlando (30 sept. – 1 okt., Naantali), intervjuis du radiostaciojn en Turku. En la arango oni inaŭguris E-lingve gravuritajn versojn de la skulptisto Wäinö Aaltonen en ties memor-muzeo, apud diverslingvaj variantoj de la poemo. (T. Oittinen, P. Saarinen)

Francio: Abundaj agaderoj

Cento da esperantistoj el ĉiaj asocioj de Parizo rond-manifestaciis sur Placo de Bastille dum 90 minutoj, disdonante milon da informiloj.

Flugfolioj "flugis" ankaŭ sur la Tuluza ĉefplaco Capitole, kie e-istoj deĵoris ĉe du tabloj da broŝuroj kaj libroj — i.a. la freŝa franclingva biografio de Zamenhof (vd. okt., p. 175). (EKC)

Agaderoj aparte abundis en Thionville: ekspozicioj en centra librovendejo, mezlernejo kaj fervoja stacidomo; duonhora elsendo ĉe loka radio; artikoloj; kaj enketo ĉe 449 homoj, el kiuj 360 (80%) favoras E-instruadon en lernejoj de EU-landoj. (R. Triolle)

Hungario: Debato en hotelo

Post kiam 90 personoj enmanigis 10 mil flugfoliojn en la centro de Budapeŝto, debaton pri la problemoj de internacia komunikado partoprenis

en eleganta hotelo i.a. sekciestro el la ministerio de eksterlandaj aferoj kaj d-ro Endre Dudich, vicprezidanto de Hungara E-Asocio. Samtage estis muntitaj du konstantaj reklamtabuloj pri Esperanto. (*Eventoj*)

Irlando: Dublina budo

La asocia prezidanto David Healey estis radie intervjuita. Aktivuloj en Dublino disdonis informojn kaj librojn. (M. Mullarney)

Koreio: Stangoj kaj tukoj

Dudeko da Seulaj e-istoj duhore disdonis informfoliojn ĉe homplena urbocentra parko. En Suwon 23 e-istoj agotagis en parko antaŭ la urbodomo. En Kwangju oni ekspoziciis E-librojn kaj -periodaĵojn en universitato. (Choe Taesok) En Taegu 20 e-istoj fiksas glumarkojn sur bushaltejajn stangojn. La benzinejo de e-isto Kim Wonsik donacis al siaj klientoj papertukojn kun frazo pri E-o. (Yung-myung Kim)



Foto: Willy Rosillo

Meksiko: Atentokapte

Kvar grupoj lokiĝis en la plej gravaj stratoj de Meksikurbo. Por bone kapti la atenton, ili portis E-ĉemizon, kaj kunhavis flagon, E-revuojn, grandan afiŝon kaj verdajn flugfoliojn. Jen unu el la grupoj. (J. k. G. Vega Acosta)

Italio: Kulpas la registaro

Ĉe informtablo en la centro de Bolonjo oni disdonis preskaŭ 3 mil flugfoliojn pri E-o kaj UN. (M. Amadei)

Renato Corsetti, Lilia Fabretto kaj Michela Lipari deĵoris ĉe stando de Itala E-Federacio en la Roma ekspozicio Espolingua (6-8 okt.). Pli ol 80 varbitoj vizitis unuagradan kurson en la posta semajno. (F. Pagliaroli)

Triestaj e-istoj ne nur informis urbo-centre, sed ankaŭ sondis — laŭ germana modelo (marto, p. 42) — la opinion de pasantoj pri E-o. Ĉirkaŭ 80% el tiuj favoras Esperanton kiel eŭropan lingvon kaj ankaŭ kiel lernejan studobjekton. Kelkaj demanditoj verve asertis ke pri la ĝisnuna nevenko de E-o "kulpas la ŝtata estraro kaj ministerio pri instruado (de Italio)". (*La Eta Gazeto*)


Kroatio: Je landa skalo

Same kiel pasintjare, Kroata E-ista Unuiĝo prezentis librojn kaj la vidbendon *Mazi* en magazeno centre de Zagrebo. KEU liveris materialojn al urboj kiuj tion petis. Ekspoziciojn aranĝis e-istoj en Osijek (urba biblioteko) kaj Gospić (lernejo). Je landa skalo, du radio-elsendoj kaj du gazetoj anoncis la Ago-Tagon. (M. Belošević)

Usono: Sur placo de l' Paco

La oficistoj de la landa asocio ELNA unufoje aranĝis Ago-Tagon en San-Francisko. Grupeto da e-istoj en la japana kvartalo de la urbo donis informilojn al pasantoj sur placo de la Paco. Urbestro Frank M. Jordan oficiale proklamis la 7-an de oktobro "Internacia Esperanta Ago-Tago en San-Francisko". (*La Orient-Ekspreso*) ★

Komputiliĝo de Esperantujo kaj esperantiĝo de Komputilujo – jen pri kio, helpe de sia (virtuala?) amiko Moldur, komputikisto Martin Weichert prezentas al ni realisman vizion.



Pasintan semajnon mi vizitis mian amikon Moldur. Li estas bona knabo, tre fervora esperantisto, nur freneza iomete – ĉu pli freneza pri Esperanto aŭ pri komputiloj?

Li salutis min entuziasmege de malantaŭ la komputila ekrano: “Imagu! Esperanto kaj la komputila reto – kia grandioza simbiozo! Interlingvo kaj Interreto, ambaŭ servas por la sama celo: tutmonda komunikado. Al ĉiu esperantisto – retkonekton, kaj al ĉiu retuzanto – Esperanto-kurson. Ha! Kia utopio! La informa superŝoseo! Virtuala realo! En *cyberspace* ĉiu parolos Esperanton!”

“Sajberspejs? Virtuala realo? Kio estas tio??”

Anstataŭ respondo li iom abrupte sidigis min en komfortan fotelon meze de komplika komputila instalaĵo kaj surkapigis al mi ion similan al motorciclula kasko kun amaso da buntaj dratoj kaj kabloj. La manon mi devis ŝovi en specon de kirasa ganto, similmaniere konektita al la granda datumaparato. Antaŭ ol la vido komplete ŝanĝiĝis antaŭ miaj okuloj, mi aŭdis liajn lastajn vortojn: “Tio estas la datumkasko, kaj ĉi tio la datumganto.” Kian trukan Moldur provas prezenti al mi?

... Ina promesis prelegi al sia loka Esperanto-grupo pri Claude Piron. Necesas iom da esplorkomputila laboro pri la populara aŭtoro. Ina enŝaltas la komputilon kaj tajpas kelkajn komandojn, kiuj konektas ŝin al la Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen. Klak, klak, ŝi entajpas la nomon PIRON kaj post kelkaj momentoj ricevas liston de pluraj libroj kaj artikoloj. Unu butonpremo konservas la liston en dosiero de ŝia komputilo. Du pliaj klaupremoj kondukas ŝin de Aleno al Roterdamo, al Biblioteko Hodler de UEA. Ŝi ripetas la procedon kaj ricevas eĉ pli longan liston, kiun ŝi ankaŭ konservas.

UEA havas hejmpaĝon

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

fondita en 1908 de Hector Hodler,
ekde nun havas

HEJMPAĜON en TTT (Tut-Tera Teksaĵo=WWW, World Wide Web)
ĉe la TTT-adreso:

<http://wwwwtios.cs.utwente.nl/esperanto/org/uea/>

Bonvenon, UEA, al la informa superŝoseo! Ni esperas ke tiuj informpaĝoj estas komenco de nova, grava informservo de UEA al ĝiaj membroj, kaj ke multaj aliaj Esperanto-organizoj sekvas prezentante sin en la reto per TTT.

Komentojn bonvolu direkti al:

Martin Weichert <martinw@cs.chalmers.se>, kiu enretigis la paĝojn, kaj/aŭ al:

Axel Belinfante <Axel.Belinfante@cs.utwente.nl>, kiu instalas la paĝojn en sia TTT-ejo.

Koncizaj informoj pri UEA provizore troviĝas ankaŭ ĉe: <http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/uea.html>.

Sincere salutas

Martin Weichert

<http://www.cs.chalmers.se/~martinw/>

<http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/>

Ina decidas ke kelkajn el tiuj libroj ŝi bezonos por sia prelego, do ŝi ŝaltas de BIBLIOTeko al LIBROservo. Klak, klak, ŝi entajpas sian UEA-kodon, kaj fina butonpremo konfirmas la mendon. Preskaŭ sammomente la Roterdama komputilo resendas al ŝi konfirmon: jes, la dezirataj libroj troviĝas en la stoko kaj estas tuj sendotaj al ŝi; la prezo jam estas debetita de ŝia UEA-konto.

Subite ŝin interrompas laŭta “pep!”. La komputilo blekas, kaj sur la ekrano prezentiĝas la vizaĝo de juna japano. Ina kompreneble scias kion tio signifas: ke ŝus alvenis komputilreta mesaĝo, kaj ke tiu nekonata junulo estas la sendinto. Ŝi legas kion la japana samideano mesaĝis al ŝi: Li studas en Japanio la historion de ŝia lando kaj intencas viziti ĝin post kelkaj semajnoj; ĉu ŝi povos gastigi lin per Pasporta Servo, kaj helpi ektrovi kelkajn informojn pri la loka trafiko en ŝia urbo? Ina plu direktas la pri-trafikan demandon al loka datumbazo pri urba trafiko, kaj respondas al la japano ke li estos bonvena al ŝia hejmo.

Reen al la serĉo pri Piron. Klak, klak, kaj Ina estas konektita al alia komputilo kun forta, sed rapida serĉoprogramo. Denove ŝi tajpas CLAUDE PIRON, kaj rapide ricevas respondon: kelkaj tekstoj de Piron estas elektronike arĥivitaj en komputilo en Usono. Klak, klak, kaj la teksto estas jam alsendita el Ameriko kaj konservata en la komputilo de Ina.

Sed la plej bona trafo estas – la “hejmpaĝo” de la aŭtoro! Sur la ekrano afable ridetas lia vizaĝo, kaj en kelkaj vivpriskribaj vortoj li prezentas sin mem al la komputilreta leganto. Bonege! Ŝi surpaperigas la portreton kaj la informojn. Tiujn ŝi povos bone utiligi en sia prelego. Nur domage ke li ne havas retpoŝtan adreson!, bedaŭras Ina, ĉar ŝi volonte farus kelkajn demandojn al li persone. Ŝi vidas nun ke la pago pri Piron venas de Kultura Centro Esperantista, kaj ŝi eklegas pri KCE. Kursoj kaj staĝoj – sonas interese! Oni povas tuj aliĝi per la komputila reto. Bonŝance troviĝas enkomputila kalendaro de Esperantoarangoj, do ŝi povas tuj kompari siajn liberajn datojn...

uala realo

Cerbumo pri Esperanto kaj novaj teĥnikoj

Ho, ŝi jam deflankiĝis de sia serĉo pri Piron. Daŭre okazas tiel kiam ŝi "veltubulas" en la reto! Ŝi prefere ekverku la tekston de la prelego. Ina malkonektas sin de la komputila reto, kaj ...

Moldur malkonektas min de la komputila revo, kaj mi vekigās al la realo. "Sed ĉu tio kion vi montris al mi estas reala?" mi demandas mian amikon, mire kaj skeptike. "Ĉu tiuj datumbazoj vere ekzistas? Tiuj Esperanto-informoj, tiu tuttera teksaĵo, tiu saltado inter kontinentoj, la per-retaj mendoj kaj aliĝoj?"

"Jes kaj ne. Ĝi estas *virtuala realo*," respondas Moldur kriptе. "La teĥnikoj, la metodoj, la iloj jam ekzistas kaj estas intense uzataj. Milionoj jam partoprenas en tiu reto, kaj centmiloj da uzantoj havas proprajn 'hejmpaĝojn', multoble interligitajn kvazaŭ araneaĵo ĉirkaŭ la tuta mondo. Perretaj mendoj estas ĉiutagaĵo en la reto. Konversaciaj rondoj en la reto, kie homoj en diversaj landoj kunsidas kaj 'kunbabilas', funkcias senprobleme. Kaj mi ankoraŭ eĉ ne menciis la elektronikajn afiŝtabulojn, la diskutejojn kaj disputejojn. Kaj tiel plu."

"Impone! Oni povus paroli pri 'PPP': *Plen-Planeda Plektiĝo*. Sed kio do estas tiuj 'hejmpaĝoj' kiujn vi menciis?"

"Ni tamen titolas tion 'TTT': *Tut-Tera Teksaĵo*. Hejmpaĝo estas informpaĝo en la reto, kie oni prezentas sin mem kaj enmetas aŭtomatajn ligojn kiuj direktas al aliaj, rilataj hejmpaĝoj. Cetere, ne nur persono, ankaŭ organizo povas havi hejmpaĝon."

"Imagu! UEA, TEJO, SAT, AIS, la Akademio de Esperanto, ĉiuj landaj aŭ fakaj asocioj povus tiel reklami pri si! Se mi serĉas kontaktadreson proksiman al mi, mi rigardas en la reton. Se mi volas mendi ion de mia landa asocio, mi faras tion per la reto. Se mi volas scii ĉu UEA ofertas iun specifan servon, mi sciiĝas per la reto — kaj eĉ tuj mendas per la reto! Forgesu la Jarlibron — vivu la reto!"

"Nu, nu, ni ne bezonas forĵeti la Jarlibron — ĝi estos kaj restos nemalhavebla informfonto ankaŭ en papera formo. Ne forgesu ke ne ĉiuj esperantistoj havas retkonekton,

nek havos. Sed por ret-uzantoj la reto tre probable forpuŝos la Jarlibron de la unua loko al la dua: ĝi povas doni tage aktualajn informojn, ebligas aktivan partoprenon, liveras senlime multajn informojn rekte en vian hejmon.

Ankaŭ kongresoj povus havi hejmpaĝon, kiu eĉ akceptas aliĝojn. Esperanto-gazetoj povas varbi abonantojn, prezenti sin per specimenaj artikoloj, kaj ricevi kontribuojn per reta poŝto.

"Sonas tro bele por esti vera. Sed tio ja estas nur utopio, fikcio ..."

"Mi nomas ĝin *scienca fikcio*. Esperanto-hejmpaĝoj, mendoj tra la reto — ĉio tio estas principe realigebla. Sed en la reala Esperantujo la reto estas apenaŭ uzata."

"Verŝajne mankas la mono! Komputilo, modemo, ret-konekto, programoj: ĉio ĉi kostas monon, kiun la Esperanto-organizoj kutime ne havas. Ili bezonas sian monon por aliaj celoj ..."

"Nu, por du celoj: varbi por Esperanto, kaj doni servojn al siaj membroj. La komputila reto ne estas celo, sed ilo — bonega ilo ĝuste por tiuj du celoj! Por tio indas investi iom da mono, sed tion multaj aktivuloj ankoraŭ ne komprenis. Ili simple ankoraŭ ne konscias pri la graveco kaj la potencialo — aŭ eĉ la ekzisto — de la modernaj komunikiloj. Vidu: ekster Esperantujo la novaj teĥnikoj faras gigantajn antaŭenpaŝojn. Sed la esperantistoj — ili postlomas la evoluon, kiel ĉiam."

"Tio ne veras!" mi ekprotestis. "La esperantistoj ĉiam estis avangardaj!"

"Ĉu vere? Kiom da esperantistoj havas retpoŝton? En la tuta mondo: ĉirkaŭ kvincent. Esperantistoj kun TTT-hejmpaĝo: eble kvindek. Kiom da landaj asocioj de UEA, aŭ aliaj Esperanto-organizoj havas retkonekton aŭ hejmpaĝon? Proksimume kvin — ĝis nun. Kiom da katalogoj de Esperanto-bibliotekoj estas alireblaj rete? Kie restas hejmpaĝo por la venonta Universala Kongreso, kun eblo aliĝi per-rete? Kie restas PIV sur komputila kompakta disko? Ne ekzistas! Kial, laŭ vi, Esperantujo tiel neglektas la modernajn komunikilojn?"

"Nu, restas ja ĉiam la nesolvita problemo pri la mankantaj supersignoj ..."

"Dirlididi! Tio ja ne malhelpis Esperanton siatempe en telegrafio. Se vi lasas tiun detalon fariĝi problemo, mi kredas ke vi ne vere deziras sukceson al Esperanto en la novaj teĥnikoj entute. Ne: ŝajnas al mi ke la esperantistoj simple ne estas interesitaj pri la novaj teĥnikoj."

"Tute male! Kiel mi aŭdis, intertempe montriĝas ke 'eĉ' legantoj de la revuo *Esperanto* familiariĝas kun komputilado."

"Do, des pli necesus nutri ilian intereson ĉi-kampan! Ĉu vi emus verki artikolon pri la komputiliĝo de Esperantujo kaj esperantiĝo de Komputilujo?"

"Ĉu mi? Do jes, se vi insistas pri tio. Kredeble mia artikolo vekos pli da demandoj ol ĝi respondos. Sed se tia artikolo ne konvinkos ilin, tiam ni invitu ĉiun membron de UEA provi vian aparaton kun la kasko kaj la ganto..."

"Bone, bone, sed ne ĉiujn samtempe, mi petas!"

Ĉu mi jam diris ke mia amiko Moldur estas iomete freneza?

Martin Weichert (Germanio/Svedio)

✉ martinw@cs.chalmers.se

adreso de TTT-hejmpaĝo:

<http://www.cs.chalmers.se/~martinw/>

Ŝparemo estas kriterio pri belo

Komence de julio 1995 la eldonejo Sezonoj (Jekaterinburg, Ruslando) eldonis *Komputika leksikono* de la siberia sciencisto Sergio Pokrovskij, ĵus elektita kiel membro de la Akademio de Esperanto. La redakcio de *Ruslanda Esperantisto* petis la aŭtoron respondi al kelkaj demandoj por la Esperanto-gazetaro.

Do, post via traduko La majstro kaj Margarita, nun Komputika leksikono. Kial nun, kial tia temo?

Ĉu Esperanto bezonas komputikan leksikonon? La respondo jesa evidenta, se oni rigardas Esperanton “la nova latino” — tio implicas universalismon ne nur geografian sed ankaŭ funkciajn. Tiam Esperanto nepre devas esti ankaŭ lingvo de scienco kaj tekniko. Mi ne estas malamiko de la angla, laŭbezone mi ĉerpis terminojn el tiu lingvo, kiu vere nun estas la faka lingvo, sed mi nepre volas ke tiuj pruntoj estu ne tro multaj kaj bone adaptitaj al la spirito de Esperanto.

Kaj viaj personaj motivoj?

Nu, estis pluraj kialoj. Unue, mi ĉiam opiniis ke ĉiu faru la laboron kiun li povas plej bone fari. Kaj komputiko estas mia fako.

Due, komputiko kaj matematiko esploras la problemojn pri la formalaj lingvoj...

Nu, Esperanto tamen ne estas kodo.

Tute prave, almenaŭ ne en la senco kiun vi donas al la vorto *kodo*. Nemalmultaj homoj en la mondo opinias Esperanton formala lingvo simila al la programlingvoj. Ni mem scias ke Esperanto estas tute normala homa lingvo, tamen la procezo de lingvo-planado, de konscia lingvokonstruado estas ne tute fremda al Esperanto. Kaj la sperto pri lingvoprojekto forte influas onian lingvan belguston.

Ĉu ĝi draste malsamas ol tiu de la ĵurnalistoj?

Ho jes. Ĝenerale, la fama tezo pri “la du kulturoj”, la scienca-teknika kaj la homscienca, entenas multe da vero. Miaj kolegoj ĉiam strebas atingi kiom eble plej multe uzante laŭeble modestajn rimedojn; la ŝparemo estas kriterio pri belo. Kaj eĉ pli grava, neprega, estas la kohero, la konsekvenco. Tio estas la ĉefaj trajtoj de la skemismo. Cetere, faka terminaro ĉiam estas pli sistema kaj formaligita sublingvo.

Al eksterulo tio povas ŝajni enua kaj teda, sed ankaŭ en tia estetiko estas loko por humuro kaj sprito, por esploro de paradoksaj konsekvencoj de la establitaj reguloj.

Se vi komparas la lingvaĵon de la fakuloj — ekzemple en la komputila reto, kie ekzistas esperantlingvaj forumoj — kun la lingvaĵo de la artikoloj pri komputiko en eksterfaka eldonaĵo, vi tuj vidus ke la fakuloj multe pli



S. Pokrovskij

ŝpareme uzas la anglaĵojn, pli volonte aplikas tradukpruntojn aŭ speciale Esperantajn esprimojn. Finfine tio ne estas mirinda: ili ja pli bone komprenas la senco de termino kaj malpli hezitas ĉu ĝi estas tradukebla. Ekzemple, ĉiuj fakterminaroj en la reto uzas la simplan kaj belsonan terminon *signo* por la nocio kiun la laikoj opinias necesa traduki per la malbela sed “preskaŭ angla” neologismo *karaktro*.

Cetere, la anglalingvanoj mem, komprenante la strukturon de siaj terminoj, pli emas traduki ilin ol tiuj por kiuj la termino estas senmetafora hieroglifo.

Evidenta la diferenco inter la du kulturoj: por la komputikisto ĉiu nova radiko estas malvenko, solvo malsprita kaj “brutforta”, kiel oni diras en la fakjargono. Male, la lingvistoj volonte paradadas per siaj latina-grekaj terminaroj. Ekzemple, por mi *tradukprunto* estas pli bela kaj sprita ol la pedanta *kalkeo*. Ie mi legis: “la aŭtoro regalias nin per fajnaj neologismoj”.

Kaj nature, *neologismo* tie signifis “nova radiko”. Por mi tiu frazo estas komika memkontraŭdiro; ĝi sonas kiel “fajnaj malspritaĵoj”.

Kaj kion vi rigardas sprita termino?

Nu, ekzemple, ni bezonis terminon por senpage havebla program-produkto, angle *public domain software* aŭ *freeware*. La malsprita solvo estus *frivaro*, sed mi rememoris pri Esperanto, kiu estas ĉies propraĵo, kaj proponis *ĉiesaĵo*. La kolegoj tuj rimarkigis ke, simile al ĉiesulino, ĉiesaĵo povas infekti (onian komputilon) je viruso, kaj nun mi vidas la terminon uzata en la komputila reto.

Do, ĉu vi kontraŭas ĉian novan radikon?

Ne, ne ĉian. Iom da ili oni ja bezonas, por fari la kunmetaĵojn! Ekzemple la plej gravaj vortoj de nia fako, *komputi*, *komputiko*, *komputilo*, estas angladevenaj neologismoj. Kaj ĉi tie klare videblas alia faka trajto: mi kontraŭas *falsan radikŝparon*.

Anstataŭ *komputiko* PIV ofertas *informadiko*. Jen ekzemplo pri falsa ŝparo. Vere, la vorto estas sufiĉe internacia, sed ĝia senco en Esperanto devas esti tute alia: *informado* estas funkcio de la gazetaro, radio, televido; tial *informadiko* estus la scienco aŭ teknologio rilata al la amaskomunikiloj (ankoraŭ unu misforma vorto!).

Oni povas objeti ke ankaŭ *komputi* estas misforma, ĉar laŭ PIV ĝi signifas “mezuri per nombroj la kvanton de kontinua fluo” ktp. Jen ekzemplo de malnecesa radikmalŝparo. “Esprimi per nombroj” logike donas *nombri*, sendepende de tio ĉu tiuj nombroj estas entjeroj. Tial *nombrilo* taŭgas ankaŭ por la kontinuaj mezuriloj. Do, tute ne mirinde, la vorton *komputilo* neniu uzas laŭ la PIV-a senco; ĝia aparteno al nia fako jam estas fakto, kaj ni rajtas retroderivi *komputi* kun la senco de aŭtomata kalkulado.

Tamen, rilate novajn radikojn, ankaŭ la ĝenro treege gravas; en beletra traduko mi nemalofte kapitulacis kaj uzis “malspritaĵojn” vortojn, kiajn mi evitas en scienca verkado. Mi eĉ riskus diri ke scienca verkado estas oazo en kiu oni pli facile povas realigi sian lingvan idealon. Iusence ĝi estas “ebura turo”, kie oni parolas lingvon logike pli puran ol ordinare — aliflanke ĝi estas tre aŭtenta vivo. ★

De "hardvaro" al ĉiesaja

Komputika leksikono. Sergio Pokrovskij. Jekaterinburg: Sezonoj, 1995. 365p. 20cm. Bind. 36 gld.

Jen evento en la panoramo de esperantlingvaj sciencaj eldonaĵoj, rimarkinda pro almenaŭ tri kialoj.

La unua kialo estas la aranĝo de la artikoloj laŭ formo de *enciklopedia* vortaro.

Ni vidu ekzemplon el paĝ. 33:

aski-ig-o: konverto de teksto en Askion; ekz-e, prezento de literoj Esperantaj laŭ x-stilo; forigo de tiparfasona emfazo aŭ ties prezento per "Askiaj" rimedoj (kp "diri kun emfazo" kaj "diri kun *emfazo*"). Kp platigi, plata teksto
A ASCIIzation

Ĉe la prezentata kapvorto (*askiigo*) videblas malimplica difino, kunteksta uzo, rilatoj kun parencaj terminoj, referencoj al aliaj artikoloj de la Leksikono, kaj anglalingva ekvivalento.

Kvankam la ĉefa celo de la verko estas terminareca, tamen oni rimarkas la tipajn ecojn de diskoniga enciklopedieto: tabeloj pri la *duum-logikaj operacioj*, skemo pri la *datumtipoj*, program-specimenoj en diversaj *programlingvoj* ktp. Do temas pri informriĉa verko, kvazaŭ eta manlibro pri

komputiko, kies nocioj estas ordigitaj alfabet-orde.

Eĉ la anglalingvaj terminoj aperas alfabet-orde inter la E-kapvortoj, tiel ke la libro uzeblas ankaŭ kiel direkta tradukvortaro E-angla.

La dua kialo por bonvenigi la verkon troviĝas en ĝia vasta perspektivo. En la libro oni trovas ne nur la aparatojn kun iliaj eroj kaj teknikaĵoj, sed ankaŭ gravajn matematikajn, logikajn kaj semiologiajn konceptojn, kiel: *kunaĵo*, *komunaĵo*, *ordo*, *ringo*, *Bulea algebro*, *grafeo*, *aŭtomato*, *algoritmo*, *procezo* ktp. Prave, ĉar — kontraŭe al ofta miskoncepto pri la komputa scienco (*komputiko*), kvazaŭ temus nur pri branĉo de elektroniko, kiu okupiĝas pri konstruado de komputiloj (*komputil-tekniko*) — la nodaj ĉapitroj de tiu scienco (datum-strukturoj, algoritmo-teorio, kod-iko) estas strikte parencaj je matematiko, logiko kaj eĉ je semiologio.

Enestas eĉ areto da telematikaj terminaj novaĵoj: *retletero*, *poŝtilo*, *distribulisto*, *retano*, *retumi* ktp, alkontribuitaj de Martin Weichert, sveduĵa

germano. Pro tiu malfermeco al parencaj scifakoj, la Leksikono estas vere *scienc-diskoniga* legaĵo.

Memkompreneble, inter la 1960 proponataj terminoj, povas troviĝi kelkaj dekoj ial ne ĉiom plaĉaj aŭ eĉ malplaĉaj. Sed ni memoru ke la taŭgeco de la lingvaj esprimoj pruviĝas en la konkreta enteksta uzado. Kaj ĝuste tio abunde okazas en la difinaj kaj ekzemplaj tekstoj de la Leksikono mem.

La tria kialo kiu vekas la atenton estas ke, post epoko densa je verkoj kun lingva gusto kiun la esperantlingvaj telematikaj retanoj nomus "idismema" aŭ eĉ "ingliša", ĉi tiu laboraĵo relanĉas la internan kreivon de la internacia lingvo. Konstrui vortojn kiel *cifereca* (anstataŭ "diĝita"), *duuma* (anst. "binara"), *ĉiesaja* (anst. "frivaro"), aŭ *programaro* kaj *aparataro* (loke de "softvaro" kaj "hardvaro"); eviti senutilajn sistem-ĥaosigajn novajn vortradikojn per la uzo de *malfari*, *agordi*, *elŝuti*, *enigilo*, *eneligo*, *komputilego*, *fona tasko*, *stirsigno*, *signalero*, *memorero*, *pepo*, *verkilo*, *literumilo*, *Paskalo*, kaj *uzulo*, signifas senpere pensi Esperante, anstataŭ mens-mallaboreme, dependeme kaj senbezzone prunti aŭ paŭsaĉi el la "granda(j) lingvo(j)".

Maŭro La Torre (Italio)

Esperanto-kongrua tekstredaktilo

Ĉapelilo 1.0. Tekstprilabora programo por Esperanto sur IBM-kongruaj komputiloj ekde Vindozo 3.0. Prezo: 200 germanaj markoj, mendebla ĉe la eldoninto: Professional Consulting (Simon Payne), Emminghausstr. 36, DE-61250 Usingen, Germanio (retpoŝto 100103.24@compuserve.com).

Jam de kelkaj jaroj eblas redakti E-tekstojn per komputilaj programoj. Tamen ili ne ĉiuj havas metodojn entajpi E-literojn, kaj apenaŭ iu ajn posedas ĝuste Esperantajn tiparojn.

Plenigi tiun truon celas la programo Ĉapelilo, kiu ampleksas tri disketojn. Papera manlibro mankas, sed krom por senspertaj novuloj la plej multaj problemoj estos forigitaj de la ampleksaj enkomputilaj helppaĝoj, haveblaj tamen nur post la instalo. Krome, la provizanta firmao proponas komputilretan helplineon.

Kiam oni lanĉas la programon, oni tuj vidas la butonojn kaj menuojn atendeblajn de Vindozo programo. Ĉiuj el la kutimaj tekstredaktilaj funkcioj ĉeestas: regfunkcioj pri alineoj,

speco kaj grandeco de tiparo ktp. Ĉapelilo bone sukcesas montri la tekston "kiel vidate, tiel presote". Elstaraĵo estas la 44 profesiaspektaj Esperantaj tiparoj en 22 tiparfamilioj.

Ĉapelilo inkluzivas kontrolilon de literumado por E-tekstoj: jen avantaĝa kapablo kiu ne ekzistas en ajna alia komerca tekstprilaborilo. Komence oni devas fari personajn aldonojn al la baza Ĉapelilo-vortaro por eviti misindikojn (aparte ĉe kunmetaĵoj), tiel ke ne plu necesas multe da intervenado kiam oni profitas tiun ĉi econ. Aldoni novan vorton kostas ekzakte unu klakigon de la muso.

La programo krome provizas nin per funkcioj pri: diverskoloraj tekstoj, enmeto de bitmapaj bildoj, disadresado,

tabel-kreado, redakto de la paĝkapoj kaj -piedoj, enlego kaj elskribo de dosieroj laŭ diversaj aliaj kodoj ktp.

Mi ja spertis kelkajn problemojn pri la programo. Tamen, laŭ Professional Consulting, nova versio ne nur korektos tiajn problemojn, sed ankaŭ aldonos duoblan kvanton da E-tiparoj, vortdividilon laŭ PAG, aldonajn sistemojn de supersigna indikado, eblon redifini la cifer-klavaron por tekstprilaboraj signoj, kaj aliajn plibonigojn.

Do: jen la ĝis nun unusola profesnivela tekstredaktilo por E-tekstoj. Se vi verkas sufiĉe ofte en Esperanto per IBM-kongrua komputilo, certe indas ĝin aĉeti.

Duncan C. Thomson (Britio)

Unu el la plej interesaj! Abonu NUN al

EVENTOJ

Petu senpagan provnumeron:
pk 87, HU-1675 Budapest, Hungario.

Kiuj plej praktike uzas Esperanton

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF) estas kun siaj dek jaroj ankoraŭ juna faka asocio. Ĝia fondkunveno okazis kadre de la 70-a UK en Aŭsgburgo, Germanio (1985). Laŭ la statuto la fakgrupo havas la ĝeneralan celon akceptigi kaj enkonduki Esperanton en komerco kaj ekonomio per praktika uzado de la lingvo.

IKEF havis antaŭulon. Temis pri Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio (EKI), kies estraranoj, E. L. M. Wensing (Nederlando), Erik Carlén (Svedio) kaj Bruno Vogelmann (Germanio) agadis en la 60-aj kaj 70-aj jaroj.

Lawrence Mee (brito loĝanta tiam en Roterdamo) kaj mi mem ekintencis en 1984 revivigi la uzadon de Esperanto en komerco/ekonomio kaj kunlaborigi la interesitajn homojn tiucele.

Dekomence la membraro de IKEF sufiĉe rapide kreskis, ok jarojn post la fondo trapasis la nombrojn 100 kaj stabiligis nun al 120 membroj en 25 landoj. Sekve de tio UEA akceptis nian fakgrupon dum la 79-a UK en Seulo kiel aliĝintan fakan asocion. La estraro konsistas nun el sep anoj, el kiuj la prezidanto kaj la financa konsilanto (Roland Rotsaert, kiu ankaŭ redaktas nian komunikilon *La Merkato*) estas estraranoj dekomence kaj ĉiam reelektitaj. Landaj "perantoj", kun la taskoj varbi membrojn, kolekti kotizojn kaj aranĝi enlandajn renkontiĝojn, ekzistas en sep landoj. *La Merkato* aperas kvarfoje jare. Ĝustatempe, je la dekjara jubileo de IKEF eliris la numero 50 kun la nova, ĵus desegnita emblemo.

Kiujn agadojn IKEF efektive faris/planas? Post sufiĉe da diskutado la estraro decidis pri agadprogramo proponita al la membraro. Ĝi baziĝas sur la ĝisnunaj spertoj. Jen la plej gravaj agadoj:

Negoco inter e-istaj komercistoj. IKEF mem ne negocas. Sed ĝi peras, instigas kaj subtenas la internacian komercadon inter siaj membroj kaj aliaj E-parolantaj komercistoj. Aperas anoncetoj de esperantistoj en *La Merkato* pri proponoj/deziroj vendi/aĉeti varojn aŭ servojn.

Reklamanoncoj de entreprenoj. IKEF havigas tiajn al E-gazetoj, ĝis nun plejparte al *Monato*. Tio havas trioblan utilon. Unue, la anoncoj estas pagataj, do la E-movado ricevas monon. Due, la traduko de tia anonco estas bonega ekzercado por lerta esperantisto. Trie, la reklamantaj entreprenoj ekscias ke Esperanto ne nur ekzistas, sed uzeblas por reklamo.

Tradukservoj. Kelkaj membroj klopodas traduki tekstojn de etikedoj, uzinstrukcioj kaj pakajsurskriboj por aldoni Esperanton kiel plian lingvon.

Terminara laboro. Ĝis nun IKEF realigis E-versiojn unue de la kvinlingva *Key Words in International Trade* de la Internacia Komerca Ĉambro, Parizo (*Proveladono de komerca terminaro*, 1989); due de la naŭlingva glosaro de la komisiono de Eŭropa Unio, nome *Ekonomio – financo – mono* (1992). Ekzistas la tre profesieca kaj prestiĝa *Internacia komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj* kun 2812 terminoj, eldonita en 1974 kaj 1975 sub aŭspicio de la menciita EKI, kaj pliampleksigita al 11 lingvoj en la tria eldono de 1990. Konsidere al la granda nombro de terminoj en

komerco/ekonomiko (ĉ. 20 000) staras antaŭ ni la kolosa tasko esperantigi kaj terminare eldoni ilin.

Verkado. Fakaj artikoloj pri nia kampo estas daŭre publikigataj. En *Monato* grandparte IKEF-membroj prizorgas la fakon ekonomio. Ĉiunmonate *Ekonomia Bulteno pri Usono* de usona membro, d-ro Goldman, raportas pri la ekonomia stato en tiu landego. Similaj bultenoj en Eŭropa Unio kaj Japanio estas planataj. Por eldono de instrulibro la ekzistantaj homfortoj ne sufiĉas.

Lekciado, instruado. Kelkaj membroj lekcias Esperante en Akademio Internacia de la Sciencoj kaj Internacia Kongresa Universitato, kaj provas varbi por E-o en ekonomikaj fakultatoj.

Aliaj agadoj. Dum la UK-semajno, IKEF ĉiujare celas al vizito de faka institucio aŭ fabriko surloka. Kelkaj membroj kunlaboras kun komercaj ĉambroj en sia lando. Ekzemple la Komerca Ĉambro de Meuse en Barle-Duc, Francio, dufoje eldonis kvarlingvan (kun E-o) broŝuron *Kiu faras kion?* pri firmaoj kaj ties produktoj en sia distrikto. Aliaj membroj agadis ĉe la ekspozicio "Ĉinio Aktive" en 1991 en Oostende (Belgio) kaj ĉe aldonata simpozio. Pluraj rolis kiel interpretistoj kaj perantoj ĉe akcepto de fremdlandaj delegacioj de ekonomiistoj. Dum speciala kunveno de IKEF-membroj en Shenzhen (Ĉinio) en julio 1994, oni vizitis ĉinajn fabrikojn.

Franz Josef Braun
Prezidanto de IKEF

Alvoko al ĉiuj rotarianoj

Rotaria Amikaro de Esperantistoj (RADE) estas regule registrita de Rotario Internacia inter ties mondaj amikaroj (*World Fellowships*). Ĝi celas konatigi Esperanton al rotarianoj kaj disvolvi ĝian uzon inter Rotari-kluboj por kreskigi iun el la ĉefaj celoj de Rotario: mondan interkomprenon.

Ĉiuj rotarianoj praktikantaj Esperanton aŭ simpatiantaj rajtas membriĝi. Jara kotizo: 5 USD aŭ egalvaloro. Informado kaj membriĝo: Marc Levin, RADE-Sekretario, 30, Rue Mar. de Lattre de Tassigny, FR-69009 Lyon, Francio; ☎/✉ +33 / 78 83 67 08.

Ĝenerala sidejo de IKEF: la prezidanto, Hornisgrindestr. 8, DE-77815 Bühl, Germanio

Financa sidejo kaj membrara administrado: Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, BE-8000 Brugge, Belgio

La jara membrokotizo estas 600 belgaj frankoj (aŭ egalvaloro en alia valuto) por landoj laŭ UEA-kategorio A, kaj 400 belgaj frankoj por landoj laŭ UEA-kategorio B.

Tridek organizoj kontaktindaj

Tradicie, UEA-estranaro pri faka agado okupiĝis plejparte pri kontaktoj kun la fakaj asocioj de UEA, kaj foje pri iniciatoj enkonduki Esperanton en la komerco.

Dume, sur la kampo de eksteraj rilatoj oni provis ligi kontaktojn kun internaciaj organizoj (IO-j), plejparte rilataj al UN kaj al Unesko. Kiam mi transprenis la respondecon pri faka agado en la nova estraro, mi havis la ideon kombini tiujn du agadkampojn, nome, kunlabori kun IO-j sur la faka tereno: peri kontaktojn inter esperantistaj fakaj asocioj kaj samfakaj IO-j, kaj krei rektajn kontaktojn inter UEA kaj IO-j kiuj interesiĝas pri la lingva problemo, tradukado, lingvistiko, aŭ spertas problemojn de plurlingveco en la propra laboro.

La plej fekunda tereno por tiaj kontaktoj estas la ne-registaraj organizoj (NRO-j) en rilatoj kun Unesko, en la kategorioj A (57 organizoj), B, kiel UEA, (ĉ. 270) kaj C (ĉ. 300). En la plej ĝisdata listo de Unesko mi markis ĉirkaŭ tridek organizojn (ĉefe en A) kiujn laŭ mia opinio utilis kontakti, aŭ pro ilia rilato al scienca agado, aŭ pro la ekzisto de similtaj fakaj asocioj aŭ instancoj E-movadaj. Dank' al la surloka kunordigo de d-ro François Lo Jacomo (ILEI-representanto ĉe Unesko), mi sukcesis renkonti — krom Unesko-oficistojn — reprezentantojn de ses IO-j dum mia dutaga restado en Parizo. Mi celis krei kontakton inter UEA kaj Unesko sur la scienca tereno, kaj rilatigi sciencajn Esperantajn organizojn — Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), Internacia Scienca Asocio E-ista (ISAE), Akademio Comenius — kun scienc-rilataj NRO-j.

Interalie, mi esploris la eblon ke AIS fariĝu NRO kun oficiala statuso ĉe Unesko. Ĉiukaze, eĉ sen tio eblas reciprokaj inform-rilatoj inter AIS kaj Unesko. Pri tio esprimis intereson Emanuel Apea, direktoro de scienca kaj teknika edukado, kaj Richard Halperin, estro de la Sekcio por Duagrada Edukado. Se tiu interŝanĝo realiĝos, ĝi estos la unua kunlaboro inter UEA (pere de AIS) kaj Unesko sur la scienca tereno.

Ankaŭ la kontaktoj kun la scienc-rilataj NRO-j estis sukcesaj.

Kun prof. Lee kaj Mark Fettes, mi renkontis d-rinon Berit Olsson, direktorinon pri kunlaboro de Internacia Asocio de Universitatoj (IAU), A-kategorio organizo kiu kunligas multajn naciajn universitatojn kaj instituciojn de supera edukado. Ŝi favore reagis al la ideo ke AIS aliĝu al IAU en la



Unu tagon post la renkontoj de Amri Wandel, en Parizo, EU-komisionano Emma Bonino (dua de maldekstre) akceptis en Bruselo UEA-estranarojn (de maldekstre) Mark Fettes, Lee Chong-Yeong kaj Michela Lipari, kaj UEA-komisiiton Hans Erasmus (vd. nov., p. 183).

kategorio de internaciaj universitatoj. Ankaŭ prof. Denis Levy, sekretario de Internacia Asocio de Universitataj Profesoroj kaj Lekciistoj (IAU-PL, kategorio B) interesiĝis pri inform-interŝanĝo kun AIS.

El la kelkdeko da membroj de Eŭropa Akademio de Sciencoj, Artoj kaj Beletro (kategorio A) 45 estas Nobel-premiitoj. Ĝi havas formalajn rilatojn kun 34 naciaj akademioj, kaj aktivas

interalie laŭ invito de Unesko kaj de Monda Organizo pri Sano. En la ĉiujaraj internaciaj simpozioj de la Akademio (ĉiam en alia lando) ĉiu povas uzi sian naciajn lingvon. Eble pro tiu principo prezidanto prof. Raymond Daudel interesiĝis pri la “Nitobe-simpozio” nun planata de UEA (vd. nov., p. 182). Nia Akademio Comenius havas kelkajn komunajn membrojn kun Eŭropa Akademio.

La ĝenerala sekretario de Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj (WFSW, kategorio A), André Jaegle, montris intereson por renovigi la kontakton kun ISAE, kiu jam ekzistis antaŭ multaj jaroj.

Reprezentantoj de ne scienc-rilataj NRO-j renkontitaj estis Roger Bille de Monda Pac-Konsilio kaj Jocelyne Gendrin, membro de Monda Organizo de la Skolta Movado. Pluaj kontaktoj eblos kun Mondpaca Esperantista Movado, resp. Skolta Esperanto-Ligo, kiu cetere jam vigle agadas kadre de la eŭropa skolta movado (vd. okt, p. 169).

Amri Wandel

Estranaro pri faka kaj scienca agado

Delegitoj de UEA:

Ĉu vi jam kandidatiĝis por 1996-1998?

La Komitato de UEA akceptis en Tampere novan Regularon pri Delegitoj, kiu difinas por ĉiuj delegitoj 3-jaran oficperiodon. La ofico de la nunaj delegitoj daŭros ĝis la fino de 1995. Ĉiuj nunaj delegitoj JD en oktobro ricevis cirkuleron pri la nova regularo kaj respondilon por kandidatiĝi por la 3-jara periodo 1996-1998.

Se vi ne ricevis la respondilon, petu ĝin tuj de la ĉefdelegito de via lando aŭ de la Centra Oficejo. Se vi ankoraŭ ne resendis ĝin al la ĉefdelegito aŭ — se mankas tia en via lando — al la CO, faru tion senprokraste, ĉar alie via delegiteco ne renoviĝos kaj via adreso ne aperos en la Jarlibro 1996!

Se vi ankoraŭ ne estas sed pretus fariĝi delegito, petu de via ĉefdelegito aŭ de la CO la regularon kaj respondilon.

Esperantistoj ekzemplas multkulturan kunvivadon

Dum la internacia scienca simpozio "Internacia familio: ĉu utopio aŭ realaĵo?" en Graz (julio 1994), organizita de UEA sub la aŭspicioj de UN, ligiĝis pluraj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizaĵoj, kiuj pretis labori pri la konkludoj kaj rekomendoj de la simpozio, "observi kaj pristudi problemojn de multetnaj kaj multlingvaj familioj".

Unu el la organizaĵoj pretaj kunlabori kun UEA kaj Rondo Famalia (RF) estas la Bratislava Internacia Centro por Familiaj Studoj (BICFS) en Slovakio. Ĝi ludis gravan rolon dum la Internacia Jaro de Familio, kaj la registaro de Slovakio esperas ricevi por ĝi apartan statuson kiel internacia centro de UN por familiaj studoj.

sociologoj ĉe BICFS. Oni formulis pli detale la projekton "Multkulturaj familioj en la nuntempa Eŭropo", kun la subprojekto "Esperanto-familioj". Oni dissendos enketilon al Esperanto-familioj kaj al familioj unuetnaj kaj unulingvaj. Dum posta seminario oni pritraktos la rezultojn de la esploro kaj rekomendos al koncernaj naciaj

Foto: BICFS



Reprezentantoj de Rondo Famalia ĉe la Bratislava Internacia Centro por Familiaj Studoj

Reprezentantoj de BICFS vizitis en aŭgusto la 17-an Renkontiĝon de E-istaj Familioj (REF) en la hungara urbeto Tata, kaj kun reprezentantoj de RF skizis projekton pri multkulturaj familioj.

Ĉe BICFS en Bratislavo RF-anoj, gvidataj de Renato Corsetti, kunsidis la 22-an kaj 23-an de septembro kun Zuzana Vranová, direktorino de la

kaj internaciaj institucioj kiel helpi solvi problemojn de multetnaj kaj multlingvaj familioj, kiuj estas pli toleremaj al aliaj kulturoj. La spertoj de ĉi tiuj familioj povas esti bona ekzemplo por la institucioj, kiel eduki unulingvajn kaj unuetnajn familiojn al pli granda toleremo kaj interetna kompreniĝo, por preventi konfliktojn.

Nuntempe BICFS kun UEA finpretigas la projekton, kiun UEA prezentos al Unesko kaj Eŭropa Unio kun peto pri morala kaj financa subteno. La projekton realigos BICFS, kiu ankaŭ organizos la internacian seminarion en Bratislavo la 1-an kaj 2-an de aŭgusto 1996. Paralele okazos en Bratislavo de la 27-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto la 18-a REF, tuj post la Praga UK.

Jozef Reinart (Slovakio)

PIV kaj aliaj

Laŭ iniciato de Kooperativo de Literatura Foiro la Kvara Mediteranea Konferenco de Esperantologio okazis en Triesto (Italio) de la 28-a ĝis la 30-de oktobro 1995, kun partopreno de ĉirkaŭ 40 homoj.

La ĉeftemon "La nuntempa leksikografio en Esperanto" oni pritraktis de diversaj anguloj. Carlo Minnaja skizis la historion de la italaj-Esperantaj vortaroj kaj priparolis la problemojn — ofte tre subtilajn — kiujn li devis alfronti por sia baldaŭ eldona *Granda vortaro itala-Esperanta* (ĉ. 50 000 kap-vortoj); Ilona Koutny same informis pri la peripetioj de la preparata *Granda vortaro hungara-Esperanta* (ĉ. 40 000 kapvortoj); Sabine Fiedler difinis la lingvistikan

EŬRAZIO

Kongreso Siberia

Post la pasintjara unuiĝo de du tutlandaj asocioj en Rusio, unuafoje kunvenis e-istoj en Tjumenjo (6-8 okt., Siberio) por Ruslanda E-ista Kongreso.

La kongresanoj multe diskutis pri la rolo de E-o kaj e-istoj en la moderna mondo, pri la neŭtraleco kaj movadaj organizoj, pri la aktualaj politike engaĝitaj e-istaj grupoj. Kongresa rezolucio alvokas UN konsideri la sperton de la sendiskriminacia lingva komunikado en la e-ista komunumo. Kiel la urbo de la sekva ruslanda kongreso (1997) estis elektita Moskvo.

Kadre de la kongreso konferencis Rusia E-ista Unio, la landa asocio de ruslandaj e-istoj. Ĝi akceptis novan statuton de REU kaj elektis la gvidorganojn. Nova prezidanto de REU fariĝis la Jekaterinburga ĵurnalistino Aleksander Korĵenkov.

La adreso de REU nun estas: RU-620063 Jekaterinburg-63, p.k. 865, Ruslando. ★

RONDO FAMILIA



ligas esperantistajn familiojn.

Aperigas la bultenon
Cirkulaĵo por esperantlingvaj paroj kaj familioj.

Se ankaŭ vi volas enskribiĝi, skribu al la Centra Oficejo de UEA.

koncepton frazeologio kaj proponis klasifikon surbaze de realaj ekzemploj en libroj, revuoj kaj vortaroj; Detlev Blanke pruvis la aktualecon de la *Enciklopedia vortaro Esperanta-germana* (1923-1929) de Wüster kaj ĝoje informis pri la disponeblo de la dua parto; Kiril Velkov ridigis la parto-

prenantojn per sprita kaj aludo-plena prelego pri la esenco kaj estonteco de la fivortaj terminaroj en nia lingvo.

La brila stelo en la konferenco estis la prelego de Michel Duc Goninaz pri la demando: "Kiel aktualigi PIV-on?". La preleganto tre klare diris ke li kaj lia 31-fakula teamo laboradas

ne super ia reverko de PIV, sed pri nura aktualigo, kvankam multaj — kaj ankaŭ li — konscias pri la bezono iam estonte verki tute novan vortaron. En la venonta PIV (kies eldon-daton ne eblas ankoraŭ prognozi) oni korektos la pres-erarojn, enmetos la 8-an Oficialan Aldonon kaj la nunan Suplementon. Kompreneble, aperos ankaŭ necesaj ŝanĝoj, kiel korekto de nekoheraĵoj, malĝustaj difinoj kaj eraraj resendoj; aldono/ĝustigo de fakaj terminoj kaj modernigo de ĉiuj eroj rilataj al geografiaj kaj politikaj ŝanĝoj de 1970 ĝis hodiaŭ. Duc Goninaz montriĝis ĉiam tre prudenta — plej bonvena trajto ĉe vortaristo —, aparte pri la tiklaj kaj eble senrespondaj demandoj; ekzemple, pri (ne)forsarko de ne plu uzataj vortoj, majuskligo/minuskligo de monatoj kaj popolonomoj aŭ definitiva aspekto de la ilustrita parto. Feliĉe, ŝajnas ke nia estonta PIV troviĝas en bonaj manoj.

Antonio Valén (Hispanio)



Carlo Minnaja ne nur konsultis, sed *ellegis* ĉiujn ĉi librojn por sia *Granda vortaro itala-Esperanta*.

AZIO

Tri tagoj defias japanojn

"Ni vojaĝu al nova epoko" — estis la moto de la tritaga 82-a Japana Esperanto-Kongreso (13-15. okt., Jokohamo).

Eble novan epokon signas la ŝanĝiĝo de la nomo: antaŭe la aranĝo nomiĝis Kongreso de Japanaj E-istoj. Ĝi montris sin pli malferma al ali-landaj e-istoj ne nur vorte: eksterlandanoj rajtis je partopreno kaj trankvilo laŭ prezoj tre alloge rabatitaj. Jen bona kaj imitinda ideo, ĉar partopreno de alilingvanoj riĉigas ĉiun E-kongreson. Modela estas ankaŭ la azia agado, dank' al kiu pageblis la partopreno de azianoj el malriĉaj landoj.

La kongresa moto fakte celas precipe renovigon de la japana movado. Eksterlandano apenaŭ sentas ties neceson: kompare al germanaj E-kongresoj partoprenas tre multaj ĝejnuloj, kaj la tre ĝentilaj japanoj ne krokodilas kiam eksterlandano ĉeestas. Venas pli da komencantoj ol al eŭropaj kongresoj, kaj oni petas alilingvanojn bone okupiĝi pri ili. Okazas programeroj publikaj (en la japana), aliaj kun interpreto, kaj aliaj nur en Esperanto. Jen maniero allogi pli da homoj.

Aperis tamen malpli da kongresanoj (350) ol pasintjare (pli ol 600). Laŭ japanaj esperantistoj tion kaŭzis la fakto ke la kongreso komenciĝis jam vendrede — ne mirige, sed kutime por eŭropaj esperantistoj. Sed tritaga kongreso grave defias japanojn, kiuj ĝuas malmulte da libera tempo.

La programo ampleksis multajn fak-kunsidojn (parte japanajn) kaj kelkajn seminariojn, kiujn prezentis precipe alilingvanoj. Harald Schicke prelegis pri "germanaj biero kaj bierkulturo". Instigite de ONO Takao li antaŭe demandis al germanaj bierfarejoj kial ilia biero ne estas aĉetebla en Japanujo. Rezulte la fama germana bierfarejo Beck donacis al la kongreso kelkcent botelojn da biero, kiujn oni gustumis dum la amasege ĉeestata prelego de Schicke kaj posta bankedo. Tio povus esti modelo por altiri ekster-Esperantiajn entreprenojn kiuj deziras helpon en malfacila merkato.

Harald Schicke (Germanio)

Novaj aspiroj en Vjetnamio

Komitatanoj kaj reprezentantoj el la tuta lando kaj el urbo Hô Chí Minh decidis pri nomŝanĝo la 15-an de septembro en Hanojo.

Ĉi tiu plilarĝigita kunsido de la Komitato de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA) decidis ŝanĝi la nomon de la asocio. Ekde nun ĝi nomiĝas Vjetnama Esperantista Asocio (VEA). Kiel daŭriganto de VPEA en la nuntempaj cirkonstancoj, VEA celas unuigi ĉiujn individuojn kaj kolektivojn de Esperanto en la lando, por intensigi la disvastigon de la universala lingvo, vastigi la amikecajn rilatojn kun diverslandaj esperantistoj kaj E-organizaĵoj; kaj aliĝi al UEA kiel ĝia landa asocio en Vjetnamio, same kiel al diversaj interkontinentaj E-organizaĵoj.

Ĉiu oficiala korespondaĵo estu adresata al: Vjetnama Esperantista Asocio, 105 A Str. Quan Thanh, Hanoi, Vjetnamio. ★

Malpermeso por kongreso

Afrikajn esperantistojn forbaras de niaj Universalaj Kongresoj du timindaj obstakloj: la viza kaj la financa. Kion fari?

Viziti Universalan Kongreson estas por iuj tradicio — sed por multaj, precipe en malriĉaj landoj, revo.

Des pli granda estas la ravo, se bona feo donacas flugbileton — kiel ekzemple al s-ro Nangu el Lukala, Zairio. Li estas emerita lernejestro, kiu dediĉis sian vivon al E-o en Lukala kaj en Zairio.

UEA kaj pluraj donacantoj preparis lian vojaĝon al Tampere. Tamen ne alvenis li mem sed lia fakmesaĝo: “Mi petadis vizon de la finna konsulejo, sed mi ne ricevis ĝin.” Tiu faksaĝo estis la fajrero kiu ekbruligis nian tutan frustrigon, akumulitan de Brajtono, Bergen, Vieno, Valencio. Fakte nur en la kongresoj de 1987 kaj 1988 ni povis bonvenigi afrikan delegacion. Post tiam

falis la viza ferkurteno ĉe la landlimoj de Okcidenta Eŭropo.

Nia indigno brulis. Kiom da danĝero povus prezenti 53-jara lernejestro el Lukala? Aŭ nia ganaa amiko Isaac Quartey, kiu frue prezentis sian vizopeton, sed simple ne ricevis respondon, kaj sekve perdis siajn ŝparitajn 1200 dolarojn por la aviadilo? Ĉu danĝeras la simpatia Yogolelo Lutombo en Burundio, al kiu oficistoj de la flugkompanio Sabena baris la vojon?

Nia indigno brulis, iom flagris en la finnaj novaĵbultenoj, kaj cindriĝis. Do, kion nun? Ĉu rezigni pri pluaj klopodoj? Ne. Ni provu ankoraŭ en 1996. En Prago eble la ĉeĥa ŝtato faros tion kion okcident-eŭropaj ŝtatoj ne faris.

Entute deko da kandidatoj el Zairio, Ganao, Benino, Togolando kaj aliaj landoj jam havas parton de la flugbileto, pro ŝparado aŭ pro amika helpo. UEA ne povas donaci flugbiletojn (ĉar ĝi transprenas la restadon kaj aliajn kostojn en Eŭropo), sed ĝi povas forte rekomendi ke *vi, la individuaj pagipovantoj, la kluboj kaj la asocioj en prosperaj landoj* faru esceptan geston de donacado.

Iu kunlaboranto sugestis: Tiu kiu ne povas ĉi-jare mem vojaĝi al kongreso, disponigu iom el la sumo ne elspezota por la vojaĝo. Triamonda Kongresa Fondaĵo, kiu en pasintaj jaroj subvenciis precipe aziajn kaj orient-eŭropajn gastojn, ricevu en 1996 enflun de kelk mil guldencoj por ke afrikanoj havu sian vicon. Sendu iom ekstran, iom el via feria buĝeto al UEA por tiu Fondaĵo, kaj ni riparos tiel la damaĝon kiun faris politikistoj.

Hans Bakker

Komisiito pri afrika agado

JUNULARO

TEJO-eroj tutmonde

Ĉi-jare la nombro de la landaj sekcioj (LS-oj) de TEJO kreskis de 34 al 37. Kiel aktivas tiuj TEJO-eroj?

Dum sia ĉi-jara kunsido apud Sankt-Peterburgo (okt., p. 168), la Komitato de TEJO aprobis la protokolon de sia nekvoruma kunsido en Ch'ōnan, kaj per tio Japana E-Junularo kaj Irana Esperantista Junulara Organizo definitive fariĝis LS. Samokaze akceptiĝis la aliĝpeto de Serbia E-Junulara Organizo.

Por ricevi superrigardon pri la junulara movado tutmonde, ni lastjare dissendis al la LS-oj — kaj al aliaj, nealiĝintaj junularaj organizoj — demandaron pri iliaj membraro, aktivularo, financa situacio, aktivado organiza, varba, kurs-okaziga ks. Ni petis ilin ankaŭ priskribi siajn ĉefajn problemojn kaj proksimajn planojn.

Ĝis nun plenigis la enketilon 17 LS-oj kaj 4 nesekcioj. Tiu nombro malsufiĉas por la menciita celo. Eĉ asocio kiu komplete malaktivigis devus respondi, ĉar alie oni ne scios pri la bezono ĝin helpi. Ekzemple pri la stato de niaj LS-oj en Kubo, Haitio, Greklando, Pollando kaj Madagaskaro apenaŭ io estas konata. Male, en

Belorusio, Slovenio, Portugalio kaj Rumanio energie organizigas junularajn asociojn.

Por ke asocioj ne “endormiĝu”, tre gravas ke ili interagadu. Fortaj LS-oj inspiru kaj instigu junajn, malspertajn aŭ etajn asociojn. Se en malgranda LS malpliĝas la aktivado, pli forta najbaro povas albloviĝi novan venton, ekzemple kunorganizante aranĝon. En Eŭropo tre bone funkcias la t.n. “ĉela” kunlaboro inter najbaraj asocioj. MEJK, BAJK, JAAK, OKEJ kaj FIKEJ nomiĝas tiuj ĉeloj en Mez-Eŭropo, resp. Balkano, Alp-Adrio, Okcidenta Eŭropo kaj Francio-Iberio. Temas pri interŝanĝo de spertoj kaj informoj ĉiakampe, komuna planado de kalendaro ĝis komunaj aranĝoj.

Multe kontribuos al la plitutmundigo de la TEJO-agado la elekto de James Rezende Piton el Brazilo. Li prenos sur sin la latin-amerikan agadon kun multaj kono kaj sperto. Aparte gravas havi viglan movadon en Azio, kio helpas refuti la ankoraŭajn antaŭjuĝojn pri “okcidenteco” de Esperanto.

Feliĉe, dank' al retroŝto jam “proksimiĝis” landoj kiel Koreio kaj Japanio. Kun Nepalo, Mongolio kaj Ĉinio ankoraŭ plej oftas komunikado per tradicia poŝto, temporaba kaj kosta. Mi mem sekvajare loĝos en Ĉinio, kio donas perspektivon je multaj personaj renkontoj en Orienta Azio.

Ni ne forgesu la sekciojn fakajn. TEJO havas du: Biciklista E-Movado Internacia kaj Eurokka. BEMI sporade organizas karavanon al la IJK, sed krome fosilias. Kvazaŭ kompanse, plene entuziasmas la kunlaborantoj de nia faka sekcio pri roka (kaj malroka) muziko. La ĵus aperintan sepan numeron de ĝia *Rok-gazet'* akompanas ege profesia-aspekta, kolora katalogo de E-muziko kaj kvinlingva speciala dosiero pri *Vinilkosmo-kompil' Volumo 1*. (kasedo kaj KD, 1995). La dua volumo aperos en 1996; TEJO ricevis de Eŭropa Junulara Fondaĵo subvencion de 40 000 francaj frankoj (ĉ. 13 000 gld.) por produkti ĝin kaj por diskonigi ĝin inter neesperantistoj. La malamatora agado de Eurokka tre helpas al ni prezenti TEJO-n kiel seriozan, atentindan organizon.

Jorg De Mulder

*Vicprezidanto de TEJO,
estrarano pri landa agado*

Letero al Barbara

Konversacianta post la enterigo de Karolo Piĉ kun ties nevino Barbara, Reinhard Haupenthal promesis skribi al ŝi por skizi la personecon de la onklo. Jen la letero.

Per ĉi letero mi revenas al niaj konversoj post la enterigo de via kara onklo Karolo Piĉ kaj mi provas plenumi mian permeson iom detale klarigi al vi la verkistan personecon de la mortinto.

Rilate eventualan anglan tradukon de iu(j) lia(j) verko(j) mi jam skribis al via edzo. Vian patrinon mi informis pri la starigo de Fondaĵo Karolo Piĉ.

Mi devas komenci mian leteron kun persona konfeso: por mi Karolo Piĉ estas la plej grava verkisto en Esperanto tiel laŭ la amplekso de lia verkaro (multon ni trovis nur nun en lia postlasaĵo) kiel laŭ la multeco de liaj temoj kaj ĝenroj kaj laŭ la vid-punkto de lingva kaj idea originaleco. Verki kion li verkis, oni povas grand-parte nur en la lingvo de li elektita: Esperanto. Jen kial perpleksigis min la demando de via edzo kaj jen kial mi respondis tiel hezite kaj necerte. Se li demandintus min pri traduko al la germana, ver-ŝajne mi respondus nee, almenaŭ se temus pri mia propra kapablo plenumi tian tradukon.

Ĝis la jaro 1979 la nomo de Karolo Piĉ diris al mi nenion. Povas esti ke ie kaj tie, en Esperantaj revuoj, mi legis lian nomon sub kelkaj poemoj aŭ artikoloj, sed tio nek fiksigi en mia memoro nek iel min impresis. En somero 1979 post la Universala Kongreso en Lucerno, prof. d-ro Juan Régulo Pérez (1914-1993) gastis en nia hejmo kaj eltiris el sia valizo la manuskripton de *La Litomiŝla tombejo*. Tuj ĉe la unua eklego tiu verko min altiris kaj fascinis tia-grade ke mi decidis fari ĉion por ke ĝi aperu publike. Okazis ke kelkaj amikoj de Régulo forte malkonsilis lin eldoni la romanon pro ties lingva aŭdaco, nekonvenca lingvo-uzo kiun multaj kredis kaj plu kredas herezo kaj atenco kontraŭ la lingvaj leĝoj de Esperanto. Tia provoko kaj kontraŭstaro de konservativaj elementoj eĉ pli incitis min. En 1981, en la Palma Dimanĉo, la verko de Karolo aperis laŭ mia iniciato. Ĝis tiam mi jam havis ampleksan korespondon kun via onklo kaj ĉi

korespondo daŭris ankaŭ en la postaj jaroj. Same kiel dekomence mi akordiĝis kaj konsentis kun la lingvaj principoj de Karolo en ties romano (ankaŭ en ties grava postparolo), ni konstatis



“Ĉiklistiko... Ĝi fariĝas via hobbio, via obsedo, via pasio, via amo...”
(*La Litomiŝla tombejo*). Karolo Piĉ biciklas, probable en la 50-aj jaroj, sur foto trovita en lia postlasaĵo.

baldaŭ ke ni havas parencajn animojn, kvankam ni loĝis tiel dise, kvankam inter ni estis diferenco de jaroj kaj, ho ve, kvankam ni loĝis en ege malsamaj sistemoj politikaj. Jen kial mia edzino kaj mi mem longe hezitis iri al Ĉeĥoslovakio, kaj nur en somero 1988 ni fine intervidiĝis sur tiu sama placo Litomiŝla kiun li tiel ame priskribis en multaj siaj verkoj.

Kaj jen la kerna punkto. Oni devas koni Litomiŝlon por pli bone kompreni la mesaĝon de la Piĉa verkaro. Estas fakte tri elementoj kiuj konstante revenadas en ĉiuj liaj verkoj, eĉ en ŝajne abstraktaj lingvaj studoj: la Urbo, la Virino kaj la Lingvo. Tio estis por li ia verka trinitato kaj li ĉiam revenadis al ĝi, jen en romanoj (kvinan ni trovis en la postlasaĵo), jen en poemaroj, en eseoj kaj en noveloj.

Kiel nul alia verkisto originala Karolo Piĉ ĉiam celis ion duoblan: kontribui al la literatura pliriĉiĝo de la lingvo Esperanto kaj samtempe zorgi pri la bezonoj de la lingvo. El ĉi zorgo rezultis tio kion oni nomis — foje eĉ disdegne — “piĉismoj” kaj kion iuj kredis lingva revolucio, anarkio aŭ renverso de la fundamentaj principoj de Esperanto. Sed Piĉ neniam renversis kion ajn. Male, li nur ekspluatis — sed tion foje ekscese kaj ĝisekstreme — la lingvajn latentajn. Aparte lin interesis la lingvaĵo de la romano, kiel vidiĝas en liaj longaj postparoloj al la tri aperintaj (kaj al kvara aperonta) romanoj. Multaj aliaj studoj dediĉiĝis al ĉi temo. Kaj jen kial liaj romanoj mem havas eĉ iom da paradigma kaj demonstra karaktero: ĉar ili estas la konkretigo de tio kion en siaj eseoj li formulis abstrakte kaj teorie. Kaj lin influis la lingva Renaskiĝo de la propra lingvo gepatra, temo ĝis

nun ne sufiĉe esplorita kaj eĉ de mi mem ne tute klare komprenata.

Mi finas. Estas mia firma konvinko ke vere kompreni kaj apreci la verkojn de Piĉ oni povas nur post ellerno de Esperanto kaj kiam — jam kiel esperantisto — oni pretas ilin aliri senantaŭjuĝe. Kiu faras tion, estos rekompencita per plej agrablaj plezuroj intelektaj.

Reinhard Haupenthal (Germanio)




Estas tempo rekotizi por 1996!

Frua pago certigas la kontinuecon en la ricevado de ĉi tiu revuo. Krome, ĝi helpas la laboron de la Centra Oficejo kaj ŝparas monon al UEA.

Antaŭdankon!

Recenzoj



Tulipoj skizofreniaj

Unuminutaj noveloj (1968). István Örkény (1912-1979). El la hungara trad. V. Benczik, L. Tárkony k.a. Redaktis István Ertl. Berkeley: Bero, 1995. 120p. 21cm. 14,70 gld.

Jen tute malordinara beletraĵo, kiu enhavas instrukcion por la uzanto, verkitan de la aŭtoro. Laŭ ĝi la noveloj, “spite al sia kurteco, estas plenvaloraj verkaĵoj”; krome “ilia avantaĝo estas, ke per ili oni ŝparas tempon” — eblas legi tian unuminutaĵon dum “la duonkuirita ovo pretiĝas”.

Pri la plenvaloreco kaj la rapida legeblo la aŭtoro certe pravas. Sed pri la tempoŝparado eblas malkonsenti, ĉar ĉi tiuj miniaturnaj noveloj invitas al pli da cerbumado ol multaj popularaj brik-dikaj romanegoj.

Aliloke la aŭtoro mem skribas ke la noveloj ja estas unuminutaj, sed dupersonaj, ĉar je la verkista flanko troviĝas minimumo da informoj, kaj je la flanko de la leganto maksimumo

da imago. Tio siavice signifas ke la unuminutaĵojn oni prefere ne recenzu, sed legu — ja ĉiu legos siamaniere. Eĉ pli ol kutime.



Tamen al tiuj kiuj ne havas eĉ unu kroman minuton por legado, indas diri ion. La noveloj tre varias, kaj iĝas des pli absurdismaj ju pli proksimiĝas la dorskovrilo kaj la vivofino de la aŭtoro. Rolas ankaŭ tulipoj skizofreniaj. En du noveloj Örkény parodias la ĉiosciadon de ĵurnaloj kaj enciklopedioj, prezentante multajn interesajn informojn “sen troa penado prenitajn el la aero”.

Alian informon, eventuale tute veran, oni ekscias el “Novaĵo”, kiu en sia tuto estas jena:

“Márton Haris, ministro, fumis cigaredon en la lito de sia loĝejo en la vilaĝo Borsodbánya. Finfuminte la cigaredon, li malŝaltis la lampon, turnis sin al la muro kaj ekdormis.”

Unu “Vaka paĝo” temas “aŭ pri ne ekzistantaj aferoj, aŭ pri tiaj ekzistantaj, pri kiuj la verkisto havas nenian direndon”. Sed pleje min ravis “Stampo”, kiu kompreneble konsistas el bela ronda stampo, kun la teksto “Diablo forportu la tuton”. Per tia stampilo oni foje emus stampi la tutan mondon — ekskluzive de ĉi tiu libro, kompreneble. En ĝi la stampo ja jam estas.

La traduko ne altrudiĝas, plej ofte ne eblas rimarki ke la unuminutaĵoj fakte estas tradukitaj.

Kalle Kniivilä (Finlando)

Deprenu la ŝelon

Amkantoj. Cants d'amor. Ausias March (1397-1459). El la kataluna trad. Abel Montagut. València: Generalitat Valenciana, 1993. 147p. 24cm. Dulingva: Esperanta-kataluna. 18,90 gld.

Por tiuj poetoj kaj pensuloj de la renesanca periodo kiuj serĉis la eliron el la mezepoka aristotelismo (tomismo) laŭ pado de Platono, la “ideala amo” signifis la vojon al la Kreanto, en kiu — kiel en la Platona “transĉielejo” (ὑπερουράνιος τόπος) — deeterne-vivas la ideo de ĉio ekzistanta, kaj kiu do estas la vera ekzisto, dum la realo estas nur ĝia kopio. Por la poetoj kiuj verkis sur tiu bazo, ĉirkaŭ la amo (por ili absolute ideala) kristaliĝis la mondo — reflektio de Dio, kiun ili serĉis.

Por la granda kataluno Ausias March verŝajne plej gravis ne “Plensaĝulino” aŭ “Lilio inter kardoj” (la adresatinoj de liaj dediĉoj), sed la mondo kiel reflektita bildo de Dio. Ne gravas ke laŭ la tradicio li turmentiĝis pro tiuj amoj, preskaŭ freneziĝis pro

la “kruelaj damoj”. La poemoj atestas pri io alia. La komplikaj kaj abundaj metaforoj montras homon bone konantan la samtempan socion, ties homojn kaj la homan animon, pasie serĉantan la vojon al Dio, komprenantan sian malperfektecon, sed kiu volas tutkore perfektigi. Tiu homo meritas nian atenton, sed trovi lin eblas nur se oni komprenas kaj deprenas la ŝelon kiun lia epoko metis ĉirkaŭ lin.

Kiu entreprenas tiun malfacilan taskon, al tiu mi povas rekomendi la poemojn de Ausias March. En la heroa laboro malkovra helpas Abel Montagut, la kataluna poeto de Esperanto. Li plurajn jarojn dediĉis por trovi la perfektan internacilingvan ekvivalenton al la poezio de sia granda samlandano. Post longa esplorado li ŝanĝis

la ecojn de la katalunlingvaj versoj kiuj ne konformis al la spirito de Esperanto. Rezultis ĝueblaj poemoj, kies legado valoras la penon.

Péter András Rados (Hungario)



Ausias March

Majstra noveldono interlingvistika

Historio de la mondlingvo. Tri jarcentoj da serĉado. Ernest Drezen (1892-1937). Red. kaj komentis Sergej Kuznecov. Trad. Nikolaj Hohlov kaj Nikolaj Nekrasov. Moskvo: Progreso, 1991 (4-a eld.). 454p. 20cm. 48,00 gld.

La klasika verko de Ernest Drezen (plue: HML) aperis unue kiel serio en *La Nova Epoko* (1928), poste jam libroforme en 1931 (EKRELO, Leipzig), represita en 1967 (Oosaka: Pirato). La nunan, kvaran Esperantan eldonon prilaboris kaj komentis la konata rusa interlingvisto Sergej Kuznecov. *Post ĉi tiu eldono ne plu eblas trankvile uzi la antaŭajn.*

La redaktoro senerarigis kaj detalege prinotis la tekston de Drezen (p. 43-339) kaj aldonis valorajn materialojn kiuj kunformas 150 paĝojn! Kuznecov, kiu verkis erudician enkondukan studon pri Drezen, rimarkis ke la originala HML "enhavas multajn erarojn kaj mankojn, kiuj estis aŭ forigitaj en la teksto [de la nuna eldono] mem, aŭ speciale priparolitaj en la komentoj" (p. 39). Tiuj 268 komentaj notoj (p. 392-420), ofte tre ampleksaj kaj detalaj, rilatas al la teksto de la unua E-eldono de HML kaj al la fragmentoj, kolektitaj, kiujn Drezen ellasis en la dua (p. 343-349).

La libron riĉigas kronologia tabelo de proponoj kaj projektoj de 467

planlingvoj; kompara tabelo de gramatikaj distingaĵoj de 30 projektoj, kiun Kuznecov reverkis sur la bazo de Drezena materialo; kaj, unuafoje en E-traduko, la praskizo de Drezen por HML (1911). Pluraj indeksoj faciligas la praktikan uzon de la libro.

Fine, ni trovas bibliografion (tamen nekompletan) de la verkoj de Drezen.

Jen vere digna omaĝo al Ernest Drezen, nepre havigenda de ĉiu serioza interlingvisto.

Detlev Blanke (Germanio)



Ernest Drezen

La unua provo je enciklopedio

Ariadna fadeno. Universala Alfabeto Nomaro-Adresaro (ANA) (1914-17). Vladimir F. Szmurlo (1865-1931). Editoris Sergej Kuznecov. Moskvo: Impeto/Ruthenia, 1993. 20+124p. 21cm. 7,50 gld.

En siaj enkondukaj klarigoj pri la pionira kompilinto kaj ties represita "Agenda-Jarlibro" (1914-17), la editoro atentigas ke temas pri la unua konkreta provo realigi Esperantan enciklopedion, sekve al ĉi-koncernaj sugestoj de Ivan Ŝirjaev kaj Petro Stojan. Poste Stojan lanĉis sian gravegan *Bibliografio de Internacia Lingvo* (Genevo, 1929), dum Ŝirjaev iniciatis ĉefredaktis la nemalhaveblan *Enciklopedio de Esperanto* (Budapeŝto, 1933-34). Kompreneble, ĉe Szmurlo la komentoj apud la koncernaj kapvortoj estas tre koncizaj kaj suprajaj. Interesaj estas la fontaj kaj bibliografiaj notoj, la adresindikoj de tiamaj movadaj aktivuloj, kaj kelkaj verk-recenzetoj. La kajero estas kompetente prilaborita kaj bone aranĝita, eĉ kun kelkaj ilustraĵoj. La reeldono de apenaŭ konata antikvaĵo certe ĝojigas minimume la ĝisostajn studentojn de nia frua historio.

Andy Künzli (Svislando)

Kompilaĵo nehomogena

Language as Barrier and Bridge (Lingvo kiel barilo kaj ponto). Editoris K. E. Müller, H. Tonkin. New York/Rotterdam: University Press of America/CED, 1992. 16+125p. 23cm. 42,00 gld.

La volumo traktas plurajn temojn (tradukado, internaciaj rilatoj, juro, lingvistiko, sociologio...), inter kiuj lingvo ŝajnas esti la sola ligilo. Temas pri referaĵoj prezentitaj en tri konferencoj aŭspiciataj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, el kiuj du kunaŭspiciataj de la Traduka Fakto de la Departemento de Konferencaj Servoj ĉe UN. Ĉu tio sufiĉas por strukturi nehomogenan kompilaĵon de foje svagaj rimarkoj?

Ankaŭ ne estas klare al kiu adresiĝas la libro. Kiel esperantisto, mi dirus ke temas pri tre valora helpilo por lobi en medioj kiuj ignoras similajn problemojn. Sed kiel universitata esploristo (i.a. pri multlingveco en internaciaj rilatoj), mi trovas ĝin ne sufiĉe scienca, en la senco ke ne ĉiuj kontribuoj estas sufiĉe apogitaj per citaĵoj,

konstatoj, dokumentoj ktp, kiuj igus la enhavon konfirmebla.

Mi komprenas ke estas malfacile devigi la vic-sekretarion de UN, Eugeniusz Wyzner ("Lingvoj en internaciaj organizaĵoj: La kazo de UN") atenti pri tiaj detaloj, sed minimumaj normoj ĉi-kampe aplikendas. Iuj kontribuoj ne valoras la penon legi: tiuj de Jean Gazarian, de Ahmedou Ould-Abdallah, kaj de Jean-Claude Corbeil.

Sed en la volumo troviĝas ankaŭ eroj valoraj. Aparte plaĉa al e-istoj estas la artikolo de Stephen B. Pearl ("Modifita Babelo: La gardantoj de la turo"), analizo pri interna lingvouzo ĉe la UN-sekretariato. Multajn utilajn rimarkojn (pri la danĝeroj de polisemio) oni trovas ĉe Sergei I. Tkachenko ("Implicita informo ĉe tradukado de UN-dokumentoj"); tajperaroj en la rusa tamen estus evi-

teblaj. Kurt E. Müller traktas en interesa artikolo kelkajn soci-lingvistikajn kazojn de politike ne nepre neŭtrala lingvouzo de usonaj oficiroj/soldatoj servantaj eksterlande. Donald G. Ellis ("Skribita lingvo kaj UN-dokumentoj") emfazas la rolon de la etnografia faktoro kaj kultura fono en la organizo de la elparolo kaj ĝian influon je la skriba prezento kaj sekve je komunikado.

Brila kaj inteligenta estas la referaĵo de Humphrey Tonkin, kiu je la preteksto pritrakti la specifaĵojn de Esperanto en Orienta Eŭropo enmetas koncize sed riĉe informojn pri la origino kaj historio de la Esperanto-movado.

La ceteraj kontribuoj traktas je bona nivelo partajn temojn, kio signalas la multifacetecon de la titola temo.

Konklude: se la celo de ĉi tiaj libroj estas eniri la sufiĉe hermetikan rondon de profesie altnivelaj kaj konataj referencofontoj, oni nepre devas atenti pri la adekvata nivelo.

Jan Koszmaluk (Francio)

Reagoj



Kion ni scias pri Bharato?

Mi tre ĝojis vidi (jul-aŭg., p. 137) la brite spritajn leterojn de Johano Rapley kaj Ian Fantom pri la malfacila prononco de *Bharato*.

Simpatiente kun la nepovo de iuj samideanoj trovi taŭgan metodon por prononci vortkomencan *bha*, mi eble raportu ke miaj varbitoj ĉiam trovas problema la vortkomencan *sc*. La kontraŭantoj de *Bharato* bonvolu kompreni ke ilia insista uzado de sia ŝatata formo *Hindio* ofendas, *geamikoj*, ofendas tiujn du trionojn de la mialandanoj kiuj ne ŝatas la kreskantan sed rezistatan hegemonion de tiu triono en norda Bharato kiu parolas la hindian lingvon kaj volas ke ĝi reĝu super la 17 aliaj konstitucie agnoskitaj bharataj lingvoj. Mi volonte apogos la kontraŭproponon *Barato*, se la e-ista publiko anstataŭigos per komenca s la *sc*-ojn en *sci*, *sciuro*, *scienco*, *sceno*, *sceptro*. Dume homoj kiuj sin opinias nekapablaj iel elturniĝi pri la sonsinsekvo en *Bharato*, eble bonvolos lerni ke *Hindlando* estas malpli ofenda ol *Hindio*?

Domaĝe se sub la rubo de tiaj malkonsentetoj ni perdas la trafon de la klavo “facila direblo”. Ni en Esperanto serĉas la facilon. Difini por ni, por sufiĉe amplekse, large, malavare konceptata nio, tian facilon kia kapablas rezisti la kaptilojn de ia pigro aŭ ia konsumismo, certe restos tasko malfacila.

Probal Daŝgupto (Bharato)

Ĉu Fina solvo?

Mi ne kontraŭstaras tion kion Rapley diris pri “Finlando” kaj “Barato”, sed mi tute malkonsentas pri lia argumento ke per aldono de konsonanto oni kreas plian silabon. Ne! Ne! Ne! En Esperanto ĉiu silabo havas unu kaj nur unu vokalon.

Rapley fokusis la atenton al *Finnlando*, sed la vera problemo rilatas *finno*. Uzante majusklojn eĉ por adjektivoj derivitaj el majusklaĵoj substantivoj, oni distingas *Fina*

kurteno kaj *fina kurteno*, *Kuba ĉambro* kaj *kuba ĉambro*.

Ronald J. Glossop (Usono)

Du sencoj bezonataj

Oni bezonas la du *n*-ojn en *Finnlando*, por ke *finna* ne simulu al *fina*, kaj por ke la adjektivoj *finnlanda* kaj *finna* havu la sencon bezonatan por priskribi la kondiĉojn en mia lando. *Finnlandaj* lingvoj estas la sveda, la finna kaj la samea (la lasta ne oficiale); *finna* (ne *fina*) rilatas la finnlingvan kulturon, finnan lingvon. La finnlandaj svedlingvanoj ne estas finnoj (nek svedoj), ili estas finnlandanoj. La nomon *Suomio* svedlingvanoj eble ne ŝatus uzi pri la lando kiun ili de jarcentoj nomas *Finland*.

Raita Pyhälä (Finnlando)

Ofico serĉas nomon

En recenzo (jul-aŭg., p. 132) A. Pettyn pledas por nomi *ombudsmano* tiun funkciulon kiun elektas la parlamento por ke li — komisie de la leĝdona povo — kontrolu la publikan administracion kaj korektu eventualajn maljustaĵojn aŭ erarojn. La anglalingvaj landoj kiuj enkondukis la oficon, transprenis la origine skandinavan vorton; germanoj kaj francoj uzas *Beauftragter* resp. *médiateur*. Por E-o mi proponis (Norda Prismo, 1964/4) *kontrolkomisiito*. Alia solvo estus uzi *mediacianto/mediaciisto*, laŭ franca inspiro.

Eskil Svane (Francio)

Beethoven ripozu en paco

Kun surprizo mi legis (sept., p. 153) ke ĥoro prezentis i.a. “Al la ĝojo” de *Betoveno*. Dio mia! La fama komponisto Ludwig van Beethoven (verŝajne temas pri li) certe turniĝus en sia ĉerko se li sciis kiel povas esti skribita lia nomo! Nia ĉefregulo devas esti ke la personajn nomojn ni lasu en paco. Tial mi subskribas:

Elna Matland, ne Elnao Matlando (Norvegio)

Red.: Personajn nomojn ni esperantigas: — se la koncernato preferas/preferis tion (ekz. Rikardo Ŝulco, Julio Bagby); — se PIV aŭ la tradicia lingvouzo adoptis Esperantan formon (ekz. Ŝekspiro, Danto, Betoveno).

Recenzo = plej bona reklamo

En sept. (p. 160) mi legis ke “plejmulto [de la legantoj venintaj renkonti la redaktoron en la UK] opinias ke troas recenzoj en *Esperanto*”. Male, laŭ mi, ili ne sufiĉas. Mi membris en UEA i.a. por aĉeti Esperantajn librojn de la Libroservo. Kiel mi povos konstati sen recenzo ĉu mi aĉetu libron? Por mi, la plej bona libroreklamo estas fava recenzo.

Howard Berman (Usono)

Pli longa UK penigus azianojn

En komitat-kunsido Tampere, estis aprobita per frakasa plimulto, super tri kontraŭaj voĉoj el Japanio, propono ke certa seminario havu lokon antaŭ la kongres-periodo.

La deziro tiel longigi la kongresan periodon devenas de honesta bedaŭro pri konfliktoj inter seriozaj programeroj (i.a. komitat-kunsidoj). Sed, dum unu plia feriotago estas nenio por homoj el evoluintaj landoj, por ni azianoj tio faras penigan diferencon. Se temas pri Japanio, la potenco de kapitalo tiel enormas ke estas malfacile entute akiri ferion.

Kiel alternativon mi proponas ke la komitato kunsidu en ĉiu vespero, ni diru, ekde la 7-a ĝis la 11-a. Aŭ tutan tagon merkrede, komplete rezignante pri ekskursado.

YAMASAKI Seikō (Japanio)

Morala testamento

Ĉi tiun leteron bonvolu rigardi kiel mian moralan testamenton, ĉar mi estas jam tre maljuna kaj tre malforta.

La E-movado devas esti absolute movado de idealistoj. Tion jam antaŭ multaj jaroj diris d-ro Zamenhof mem. En ĝi ne havas lokon komercistoj (negoculoj), diversaj parazitaj, hipokrituloj, karieristoj, friponoj, adorantoj de la ora bovido, faŝistoj kaj antisemitoj. Per unu vorto: negativuloj. Nur tiuj kiuj agas por pli bela estonteco de la homaro. Ĉar tiu batalo donas enhavon, valoron kaj celon al ilia vivo.

Andreo Ŝalamon (Israelo)

Laste aperis



Foli- ume



Dorsosako de Panjo Rut', La. Sandor J. Bako (1915-1990), Claude Piron (1931). Viena: Pro Esperanto, 1995. 109p. ISBN 3-85182-032-0. 23cm. La unua el tri volumoj kun noveloj de ambaŭ aŭtoroj, pri simplaj homoj en specialaj vivsituaĵoj. 22,80 gld.

Du neĝeroj. Hans Jasik (ps.). Oosaka: Riveroj, 1995. 105p. ISBN 4-947691-02-6. 18cm. Ilus. Tri erotikaj rakontoj. 12,60 gld.

Esperanto-Lesebuch. Mit Wort- und Grammatikerklärungen und Übungen. Herbert Mayer. Viena: Pro Esperanto, 1995. 182p. ISBN 3-85182-035-5. 23cm. Legaĵoj je kvin niveloj de malfacilo. 24,00 gld.

Gramatiko de la ĉeĥa lingvo. Miroslav Malovec (1953). Dobřichovice: KAVA-PECH, 1995. 27p. ISBN 80-85853-17-5. 17cm. Konciza trarigardo. 3,30 gld.

Hetajro dancas. Eli Urbanová (1922). Chapecó: Fonto, 1995. 327p. 21cm. "Senkliŝa, senpruda kaj sentabua" aŭtobiografia romano de la ĉeĥa poetino, kiu "pulsas per tono de rekta parolo" (Rossetti). 51,60 gld.

Kojonov Luĉjo. Rusa erotika poemo. El la rusa trad. Valentin Melnikov. Moskvo/Jekaterinburg/Bervalo: Luĉjo-Amikaro, 1995. 19p. 21cm. Longtempe malpermesita poemo pri amorema vidvino, verkita probable de la frato de Puŝkin. 3,00 gld.

Kompaktwörterbuch Esperanto. Esperanto-Deutsch, Deutsch-Esperanto. Erich Dieter Krause (1935). Leipzig/Berlin/München: Langenscheidt, 1995 (3-a, reviziita eld.). 190+279p. ISBN 3-324-00607-4. 15cm. Kun po 12 000 kapvortoj. 41,70 gld.

Kruĉo da saĝeco. La. Vasilij Eroŝenko (1890-1952). Komp. Mine Yositaka. Toyonaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 1995. 94p. ISBN 4-930785-43-X. 18cm. Kvar fabeloj kiujn Eroŝenko verkis en la lastaj monatoj de sia vivo, retrovitaj 30 jarojn poste. Kun studo de la kompilito. 12,60 gld.

Ludovikologia dokumentaro XVII. Spikumaĵoj II. Tōkyō: Ludovikito, 1995. 529p. 21cm. Eble neniam kompletigotaj necesaj aldonoj al la PVZ. Kolekto 17. Diverslingvaj lernolibroj kaj broŝuroj el 1888-1898. 72,00 gld.

Memorlibro omaĝe al Andreo Cseh. Red. Katalin Smidélus. Sabatejo [Szombathely]: la redaktinto, 1995. 128p. ISBN 963 650 215 3. 23cm. Dekoj da kontribuoj pri liaj vivo kaj metodo. Kun fotoj, leteroj, kaj aliaj vivdokumentoj de Cseh. 22,50 gld.

Novaj vestoj de la imperiestro kaj du aliaj fabeloj. La. Hans Christian Andersen (1805-1875). El la dana trad. Ib Schleicher. Kopenhago: Koko, 1964 (2-a bindo 1995). 51p. 26cm. Bind. Ilus. 15,00 gld.

Prenu plu. Gbéglo Koffi (1957). Beauville: SAT-Broŝurservo, 1995. 112p. 20cm. Lernolibro por progresantoj, precipe franclingvaj. 12,00 gld.

Seuramatkalla. Aira Kankkunen (1928). Göteborg: la aŭtoro, 1994. 63p. ISBN 91-972 463-0-1. 21cm. Finnlingva. La poemaro "Interrilatoj", en traduko de la aŭtorino mem. 8,40 gld.



Ĉu eblas rezisti al romano "senkliŝa, senpruda kaj sentabua" de la Praga poetino?

Sin nutri en la naturo. Edmond Dazun (1909), André Andrieu (1932). Beauville: Amika E-Rondo Laŭtel, 1995. 223p. 21cm. Ilus. Enciklopedieto de kelkcent manĝeblaj plantoj kreskantaj en la naturo. Kun listo de venenaj aŭ danĝeraj plantoj, kaj latina-Esperanta leksikono. 28,80 gld.

Travivaĵoj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito. La. Jaroslavo Haŝek (1883-1923). El la ĉeĥa trad. Jozefo Štadler. Beauville: SAT-Broŝurservo, 1995. 152p. 21cm. Aventuroj de (ŝajn)naivulo. La unuaj dek ĉapitroj. Reeldono de traduko el 1932. 13,50 gld.

Vortaro Esperanta-ĉeĥa. Karel Kraft (1926), Miroslav Malovec (1953). Dobřichovice: KAVA-PECH, 1995. 239p. ISBN 80-85853-11-6. 17cm. Ĉ. 26 000 vortoj. 26,40 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

• Ek al novaj herooj!

Post *Asteriks gladiatoro* kaj *Asteriks kaj Kleopatra*, la kroata eldonejo Izvori jam presas la trian volumon de la serio, *Asteriks kaj normanoj*. Pro la neantaŭvidita sukceso, la du unuaj volumoj estos represitaj komence de 1996, kaj Izvori baldaŭ eĉ lanĉos la unuajn volumojn de la serioj Lucky Luke (vakera heroo) kaj Leonardo (freneza inventisto). (*InterTEMPO*)

• "Plej herooa periodo"

"Nia turno al Stalin signifas por ni religiĝon kun la revoluciulaj generacioj de la plej herooa periodo en la historio de nia lando": jen frazo el la premiera numero de *Stalina Vero*, ĵurnalo de komunistoj-laboristoj en Petrozavodsk, kiu aperis en julio. (*La ondo de Esperanto*)

• Ne plu Paco

La organo de Mondpaca Esperantista Movado, *Paco*, ne plu aperos ekde 1995 ĝis reorganizado de MEM. Jam en la lastaj jaroj, *Paco* malfacile eldoniĝis, unuavice pro la ekonomia krizo en Orienta Eŭropo. (MEM)

• Pioniro elfosita

Editorita de la kostarikaj e-istoj Jorge Antonio Leoni kaj Shirley Barquero, aperis en la arta kaj literatura revuo *Káñina* de Universitato Costa Rica ĝis nun ne eldonita manuskripto de la elstara kostarika intelektulo Carlos Gagini (1865-1925), *Cartilla Esperantista* ("Notaro pri E-o", 1920).

• Amiko 75-an fojon Juna

Per la n-ro 95/4 *Juna Amiko* festis sian 75-an aperon. En JA 95/3 ni legis: Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo (3876 Belmont Avenue, San Diego, CA 92116, Usono) proponas starigi Ago-Tagon por Infanoj. Ĝi estu la 14-a de februaro, kiu en kelkaj landoj jam estas Amo-Tago (Sankta Valenteno), kiam oni sendas am-salutojn. Klasoj el ĉiuj mond-anguloj kantu la kanton "Sur la tero" (JA 95/2, p. 4) kaj sendu amikajn salutojn al foraj landoj. Tutmondeco povus interesi ĵurnalistojn.



• Albanio: Unuafoje internacie

Albana E-Ligo aranĝos, kunlabore kun profesia turisma agentejo, Esperanto-konferencon en Albanio (Hotelo Adriatic, Durrës, 3-8 apr. 1996). Post-konferenca rondvojaĝo kondukos al la ĉefurbo Tirana, al antikvaj vidindaĵoj ktp. Informoj: Trond Øgrim, Trasopyn. 12 B, NO-0671 Oslo, Norvegio.

Ĉiudimanĉe funkcias radiokurso en Skutaro (Shkodër) ekde junio, starigita de Zef Mjeda surbaze de la libro *Esperanto en dialogoj* de A. Pettyn.

• Aŭstrio: IEMW remalfermiĝos

Post la fino de konstrulaboroj en novembro, Internacia E-Muzeo en Vieno plene funkcios ekde januaro 1996. (H. Mayer)

• Bulgario: Bona Bazo

Okaze de la 46-a Kongreso de Bulgara E-Asocio (2-3 sept., Koprivštica), oni malfermis la "Esperanto-Bazon" Haĝi Nejko, domon disponeblan por ĉiaj E-aranĝoj. Informoj ĉe BEA (p.k. 66, BG-1000 Sofia).

• Ĉinio: Ŝipkongreso

La 3-a Ĉina Kongreso de E-o (29-30 aŭg., 270 partoprenantoj el 26 provincoj) elektis novan komitaton kaj estraron. Ĉina E-Ligo nun havas prezidanton, TAN Xiuzhu, dum ĝen. sekretario restis ZOU Guoxiang. De la 1-a ĝis la 3-a de okt. oni plu kongresis ŝipe, sur la rivero Yangzi inter Chongqing kaj Wuhan. (Wang Jianbing)

• Francio:

Leĝpropono pri Esperanto

Post renkonto kun e-istaj asocioj, la komunista grupo prezentis en la parlamento, la 13-an de oktobro, leĝproponon pri E-instruado samranga kun tiu de aliaj fremdaj lingvoj en la elementaj kaj mezgradaj lernejoj. (*Le Travailleur Espérantiste*)

• Japanio: Esperantaj karesnomoj

La orient-japaniaj fervojoj decidis karesnomo la linion en la nordorienta regiono "Songolinio galaksia", laŭ la novelo *Nokto de la galaksia fervojo* de MIYAZAWA Kenzi (kiun esperantigis KONISI Gaku). La kompanio instalas en ĉiu stacio tabulon indikantan ties E-karesnomon, kun japana traduko, apud la oficiala japana nomo. (En 1985 furora desegnofilmo el la verko uzis Esperanton por ĉiuj surskriboj.) Konsilis pri la traduko E-Societo de Ihatovo, estrata de SATŌ Syōiti, profesoro pri la angla ĉe kolegio kie la regula studfakaro inkluzivas E-on.

• Katalunio: Post Zamenhof, Mimó

La 26-an de apr. la nomo de Luis Mimó Espinalt, fondinto de la "Analiza skolo", estis atribuita al centra pasejo en la urbo Sabadell, proksime al bulvardo Zamenhof kun ties Zamenhof-monumento. (*KAE-Informilo*)

• Madagaskaro: Invito kongresi

En la programo de la Unua E-kongreso de la Hinda Oceano kaj Orient-Afrika landoj (23-30 aŭg. 1996, Antananarivo): Cseh-metoda kurso, ekzamenoj de ILEI/UEA, ekskursoj al historiaj lokoj, kulturaj aranĝoj. Alflugo kun rabatitaj prezoj el Parizo, Frankfurt kaj Zuriko. Kontakto: Esperanto en Malagasio, Lgt. 387, Cité Analamahitsy, MG-101 Antananarivo.

Ĉe la sama adreso funkcias Universala Kultura Servo de Eugène Raveloson, kiu senpage instruas koresponde al pedagogoj, ofte en foregaj regionoj de la lando. Por ke ili povu aŭdi E-on, UKS eldonos magazinon sur kasedo. Sendu registritajn kontribuojn aŭ neuzitajn kasedojn al UKS, aŭ subtenon al la UEA-konto "unks-k". Raveloson ankaŭ redaktas la dumonatan bultenon *Esperanto en Malagasio*, kiun kompostas Tammo Kanter en Nederlando. Specimenan numeron petu de Hans Bakker (Kastelenstr. 231-II, 1082 EG Amsterdam, Nederlando).

• Ukrainio: Vizito en Alzaco

Ĉiujare ĉ. 150 ukrainaj infanoj pasigas monaton ĉe familioj en Alzaco, laŭ invito de la asocio "La infanoj de Ĉernobil". Dum la ĉi-jara restado Esperanto estis ofte uzata, dank' al pastro Prudko (Ukrainio) kaj Michel Basso (Francio). (*Eventoj*)

La 13-an de julio en la Provinca Muzeo de Ternopil oni inaŭguris konstantan ekspozicion pri Esperanto. Kontribuajoj estas atendataj ĉe Ukrainia E-Asocio (p/k 83, Ternopil, UA-282001). En la sama urbo estas starigota memortabulo de Miĥajlo Jurkiv, aŭtoro de la unua E-lernolibro por ukrainoj. Helpemuloj uzu la UEA-konton "ukre-j" de UkrEA.

Dum la 10-a Internacia Medicina E-Konferenco (12-15 jul., Ternopil), plejparte dediĉita al la Yumeiho-terapio, oni prezentis la ukrainan tradukon, fare de Igor Galajĉuk kaj Viktor Pajuk, de la Esperantlingva *Orienta speciala Diina masaĝo* de SAIONJI Masayuki. La libro aperis en 5000 ekzempleroj. (V. Pajuk)



• Benino: La verdaj geknaboj

En Cotonou, la 30-an de aŭgusto, Gaston Houssou aranĝis "Tagon de Amikeco" por la E-infanklubo "La verdaj geknaboj". Fine de amuza tago, la infanoj konkursis pri la kvanto de konataj E-vortoj. Subtenaj donacetoj (ludiloj, lerniloj ks.) bonvenas pere de Houssou (B.P. 163, Cotonou).



• Fervojistoj: Jarkunveno kun ministro

Inter la centoj da ĉeestantoj de la 6-a jarkunveno de Rumana E-a Fervojista Asocio en Galați (8-10 sept.) estis la rumana ministro pri eksterlandaj aferoj kaj la regiona prefekto. REFA, unu el la plej aktivaj movadoj en Rumanio, sendis ĉi-aŭtune grupon de 40 membroj al Bydgoszcz (Pollando) por progresiga lingvokurso. (*Internacia Fervojisto*)

• Instruado: Inunda intereso en Italio

Kadre de la instru-sciencia projekto ESP² (maj., p. 85), la Tria Universitato Roma anoncis en marto senpagan korespondan E-kurson por profesiaj instruistoj, kiuj poste povos instrui la lingvon en eksperimentaj kursoj. La nombro de la kursanoj estis limigita al ĉ. 50, sed la aliĝpetoj nombris pli ol 300. En novembro la kurso komenciĝis por la antaŭdecidita nombro, sed oni serĉas alian vojon (projekton) por kontentigi la ceterajn petintojn. (M. La Torre)

Reviziita de Renato Corsetti, ĵus reaperis la klasika itala lernolibro *Manuale di Esperanto* de Bruno Migliorini (1923), kun enkonduko de la fama lingvisto Tullio De Mauro, kiu la unuan fojon skribe deklaras sian apogon al Esperanto. (*L'Esperanto*)

Dum la 9-a kongreso de Unio de Katolikaj E-istoj Italaj en Grottammare (8-12 sept.), kvindek da ne-esperantistaj instruantoj el la provinco Ascoli Piceno partoprenis studseminaron pri la propedeŭtiko de Esperanto, gvidate de la provinca studestro Giuseppe Maraglino. La atingo rilatas al cirkulero de la itala eduk-ministerio (jun., p. 105). (*KEC-Bulteno*)

ILEI kompilas kalendaron de pedagogiaj aranĝoj, liston de ĉiaj konkursoj, kaj tutmondan tabelon pri ferioj de lernantoj kaj instruistoj. Sendu informojn antaŭ la 15-a de januaro 1996 al la sekretario: Marija Beloŝević, Sveti duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio.

• Interlingvistiko: Stipendio

Disertacioj esperantologiaj aŭ interlingvistikaj, ellaboritaj en la spirito de L.L. Zamenhof kaj Ivo Lapenna, kaj oficiale akceptitaj de universitata instanco en 1995, povas kandidati por la Stipendio Ivo Lapenna. Petu regularon ĉe Torben Svendsen, Vanløse Allé 57, 1.tv., DK-2720 Vanløse, Danlando. La disertaĵoj mem estu senditaj, antaŭ la fino de februaro 1996, al d-ro Klaus Perko, Lendkai 111, AT-8020 Graz, Aŭstrio.

• Radio: AERA raportas

RAI (Radio Roma) uzas nun pli bonajn frekvencojn por sia E-programo (sabate, 20-20.20 UTC = 21-21.20 laŭ Mez-Eŭropa Tempo), riceveblajn en tuta Eŭropo. 6030 kHz (49,7m) kaj 7235 kHz (41,5m). ★ La eŭropa frekvenco de Radio Havano (dimanĉe, 19.30-20 kaj 22-22.30 UTC) riceveblas

en plejparto de la kontinento kaj en la Mediteranea regiono: 11705 kHz (25,6m). ★ La satelitaj elsendoj de Radio Vieno uzas ekde decembro la novan radio-reton Astra Diĝita Radio, por kiu necesas taŭga (krom)aparato. Astra, 19,2 gradoj oriente, 11,141 GHz Hpol, 8,10 MHz. ★ La elsendo de Ĉina Radio al Latin-Ameriko (ĉiutage, 22.30-23 UTC) aŭdeblas ankaŭ en Eŭropo je 6950 kHz. (AERA)

Amikaro de Esperanto en Radio (AERA) funkcias kadre de Organiza Societo de Internaciaj E-Konferencoj (asocio kunlaboranta kun UEA ekde la Tampere UK). Ni erare skribis (sept., p. 160) ke AERA estas gvidata de Andrzej Pettyn, Bruno Masala kaj Ahto Kaljusaar — ili fakte estas la anoj de laborkomisiono de radio-ĵurnalistoj kiun Tutmonda E-ista Ĵurnalista Asocio starigis i.a. por kunlabori kun AERA.



• Virinaj aferoj: Paralele apud Pekino

Grupo da esperantistinoj japanaj, ĉina kaj usona partoprenis apud Pekino la forumon de neregistraj organizoj (30 aŭg. – 8 sept.) paralelan al la 4-a UN-Konferenco pri Virinoj. Ili muntis ekspozicion pri E-o, enketis pri lingvaj malfacilaĵoj en la forumo, kaj aperigis artikolon en ties ĵurnalo. Por kunlabori en similaj okazaĵoj, kontaktu AIHARA Misako (Satukisô 7, Tuga 3-15-13, Wakaba-ku, Tiba-si, 260, Japanio).



• Amariglio: Stimulis progreson

Sonia Amariglio, vicprezidentino de la E-Federacio de la regiono Ile de France, ricevis, la 4-an de oktobro en la Salono Médicis de la franca senato, arĝentan medalon de la prestiĝa Societo por Stimuli la Progreson. Medaloj de tiu societo estis jam atribuitaj al Albert Schweitzer, Jacques Cousteau, Luc Montagnier kaj aliaj famuloj.

Wells: Venezuele kaj tutmonde

Okaze de profesia vizito al Venezuelo, prof. John Wells povis pasigi unu tagon kun la e-istoj de Caracas. En la Katolika Universitato Andrés Bello, kie ĵus lanĉiĝis E-kurso por komencantoj, li prelegis la 6-an de oktobro pri “Lingvistiko kaj E-o”, kun sekva traduko en la hispanan farita de prof. Jorge Mosonyi, konata lingvisto-antropologo kaj prezidanto de Venezuela E-Asocio. Rezultis pluraj raportoj en la venezuela gazetaro.

Wells nun havas propran paĝon, cetere plurlingvan, en la Tut-Tera Teksaĵo. Vi povas “viziti” lin ĉe <http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/home>.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Francio: Raymond Boré. Usono: Boris Kolker.

PATRONOJ DE TEJO 1995

Pakistano: Mian Salam Shany. Entute ĉi-jare 92 Patronoj.

SOCIETO ZAMENHOF 1995

Nederlando: Ans J. Bakker-ten Hagen. Svedio: Zinovi Kurolap. Japanio: Akimiti Take-mura. Entute ĉi-jare 267 SZ-anoj.

PATRONOJ DE TEJO 1996

Britio: Robert Haddon. Finnlando: Akseli Kirsilä; Vuokko Tellervo Heinäsuo. Nederlando: Hans ten Hagen; Miny Massar; W.L. van Leeuwen.

SOCIETO ZAMENHOF 1996

Aŭstrio: Sieglinde Stamm. Belgio: Renée Herinckx-Ost. Finnlando: Juho Pyykönen; Raita Pyhälä; Terttu Tyynelä. Germanio: Martin Gründler. Nederlando: M. van Bentum-v.d. Broek; G.A.M. van Bergeijk; Hans ten Hagen; E.C. Klaver; Joop W. Moonen; Simon P. Smits; Miny Massar; Willy Keizer; Yfke Weidema. Usono: Catherine L. Schulze.

DONACOJ 1995 (gld.)

ĝis la 31-a de oktobro

Fondaĵo Afriko: Aŭstrio: E. Quietensky (por 4-a Afrika Kongreso) 25,00. Germanio: M. Gründler 33,55. Italio: A. kaj M. Amerio 98,80; D. Trombetta 1910,16. Nederlando: G.F. Makkink 500,00. Sumo ĉi-jara 12 253,58.

Konto Ĉinio: Nederlando: R. Moerbeek 100,00. Sumo ĉi-jara 200,00.

Fondaĵo Canuto: Finnlando: H. Kesälä 20,00. Francio: J.-C. Trebouet 15,00. Germanio: M. Gründler 33,55. Kanado: S.T. Norvell 50,00. Nederlando: J. Bosse-Sibbel 10,00; T. van Huis-Staritsky 10,00; N.C. Kuiterman-van Goor 15,00; D. Massar 35,00; R. Moerbeek 50,00; J.P. Moonen 100,00; A. d'Oliveyra 28,00; W.A. Verloren van Themaat 10,00. Slovenio: J. Židanik 50,00. Usono: L. Harmon 13,00. Sumo ĉi-jara 10 168,47.

Ĝenerala Kaso: Germanio: M. Gründler 10,07; O. Hub 16,76. Nederlando: I.M.J. Dijkhoff-Lenze 250,00. Sumo ĉi-jara 4186,01.

Konto Espero: Nederlando: R. Moerbeek 100,00. Svedio: U. Luin 200,00. Usono: Oficejo de ELNA 15,10. Sumo ĉi-jara 1962,81.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Belgio: E. Kehlet 35,00. Finnlando: H. Kesälä 20,00; T. Sormunen 162,00. Francio: J.-C. Trebouet 15,00. Germanio: L. Mahn 10,00; H. Schindler 100,00; B. Vogelmann 100,00; H. Vogt 50,00; M. Vogt 38,00. Italio: A. Fighiera-Sikorska 30,00. Kanado: S.T. Norvell 50,00. Nederlando: N.C. Kuiterman-van Goor 10,00; R. Moerbeek 220,00. Slovenio: J. Židanik 50,00. Usono: W. Harmon 13,00. Sumo ĉi-jara 1959,87.

Volontula Fondaĵo: Belgio: E. Kehlet 35,00. Britio: K.N. Callow 15,06. Finnlando: H. Kesälä 20,00. Francio: J.-C. Trebouet 15,00. Nederlando: N. Moerbeek 50,00; R. Moerbeek 20,00. Sumo ĉi-jara 2077,32.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

G. ABBAS-DE HOOP (1917-1995) mortis la 31-an de oktobro en Groningen. Ŝi estis, same kiel ŝia edzo forpasinta antaŭ du jaroj, dumviva membro kaj mecenato de UEA.

Henri W. APPEL (1912-1995), estrarano de Sud-Afrika E-Asocio ekde ties fondo en 1962 kaj delegito de la sama jaro, mortis la 2-an de aŭgusto en Benoni. Li gvidis multajn kursojn, eĉ dum la dua mondmilito al kun-milit-kaptitoj en Indonezio.

Enzo ARIANI (1924-1994), fakdelegito pri belarto en Florenco dum 27 jaroj, mortis la 11-an de aŭgusto 1994.

Paul BÄCHLI (1901-1995), delegito dum trideko da jaroj en Baden (Svisio) kaj honora membro de Svisa E-Societo, kies dokumentan servon li prizorgis, mortis la 10-an de marto.

Engelbrecht HANSEN (1909-1995), fakdelegito pri filatelo en Holbæk (Danio), forpasis antaŭ nelonge.

Aleksandar HRSTIĆ (1915-1995), profesoro pri ekonomio, e-isto dum 60 jaroj, delegito en Split (Kroatio) 40 jarojn, forpasis la 15-an de oktobro. Li estris la lokan societon, gvidis E-kursojn, kaj estis vicprezidanto de la Ĉefkomitato por Kroatio de Jugoslavio E-Ligo.

Pedro MAGAÑA EROSA (1901-1995), maja-devena infankuracisto, dumviva membro, fakdelegito pri medicino kaj radio-amatorismo dum 33 jaroj, Cseh-instruanto, mortis la 10-an de oktobro en Chihuahua (Meksiko).

Cedilha de OLIVEIRA NETO (1911-1995), fakdelegito pri framonismo, forpasis la 21-an de julio en Vassouras (Brazilo). Vidvino de la aktivulo Braz Cosenza, ŝi fondis kun li, en 1951, Kulturan Kooperativon de E-istoj, kiun ŝi vicprezidis. Ŝi estis ofta preleganto kaj E-tradukanto.

Prof. d-ro Roman STOPA (1895-1995), specialisto pri afrikaj lingvoj, partopreninto de la Krakova UK (1912), kiu gvidis E-kursojn por instruistoj inter la du mondmilitoj, forpasis en Krakovo la 15-an de aprilo.

Anoncetoj



Esperantistoj en la tutmonda Universitato de la Tria Aĝo, ĉu instruantoj ĉu aktivaj lernantoj. Ni jam konas kvindekonojn en 12 landoj sed mankas ĉefe Azio, norda Eŭropo, Afriko. Donu kaj ricevu informojn per nia *Ligilo* ĉe 17 The Grange, Shepherdswell, Dover CT15 7QB, Britio.

Kvar teatraĵoj estas grandformata, kolore ilustrita libro originale verkita de usona profesia aktorino. Plejparto de la verkoj en la libro ricevis literaturajn premiojn. Mendu la 148-paĝan libron kontraŭ USD 15,00 (inkluzive sendkostojn) de: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530, Usono. UEA-konto: "elna-w".

Liberala profesiulo, mezaĝa, idealisto, serĉas kunulinon por fondi esperantistan familion kaj realigi noblan idealon ĉe komunumo en amazonia regiono. Jozef Frank, C.P. 1015. CEP 69908-210, Rio Branco – AC, Brazilo.

Al Sarajevo nun eblas sendi leterojn (ĝis 20 gramoj), bildkartojn kaj poŝtkartojn. Do, tiaj sendaĵoj povas nun rekte atingi Radion Sarajevo, per la simpla adreso: Radio Sarajevo, Esperanto-redakcio, Sarajevo, Bosnio-Hercegovino.

Katalin Smidélus havas novan adreson: HU-9700 Szombathely, Kós Károly u. 29, Hungario.

Ĉe personaj nomoj kursiva cifero indikas aŭtorecon de teksto, dika cifero rilatas al foto. Aliloke dika cifero aludas relative longan artikolon pri la temo. Ĉe libroj, kursivaj titoloj signas recenzitajn verkojn.

Aagard, R. 40
 Abonoj 194
 Abraham, G. 16, 166
 Administrado de UEA 108
 Afriko 8, 41, 112, 125, 210
 Ago-Tago 38, 88, 201
 Ahomäki, J. 152
 Ahtisaari, M. 145
 Akademio de Esperanto 138, 151
 Akademio Internacia de la Sciencoj 45, 150
 Alaniz, T. 152, 153
 Albano 68, 101, 216
 Albu, V. 45
 Albuquerque, C. 26
 Alonso Núñez, A. 85, 97
 Alos i Font, H. 133, 180
 Altieri Biagi, M.L. 42
 Álvarez, S. 39, 65
 Amariglio, S. 217
 Ameriko 26, 64, 65, 105, 112
 Amikaro Bruno Gröning 147
 Amoureux, J. 69
 Andersson, N. 159
 Anjo Amika 33
 Argentino 38, 64
 Armenio 197
 Arto 57, 78, 79, 118, 158, 160
 Asorti 153
 Auderskaja, T.V. 196
 Auld, W. 161
 Aŭstralio 176
 Aŭstrio 18, 47, 71, 99, 128, 137, 197, 199, 216
 Azio 9, 66, 104, 112, 158
 Bähr, M. 169
 Bakin 195
 Bakker, H. 8, 112, 182, 210
 Balbin, J. 138
 Banet-Fornalowa, Z. 47, 69, 189
 Baur, A. 59
 Becker, G. 129, 189
 Becker, U. 136, 156, 196
 Belartaj Konkursoj 54, 90, 113, 156, 191
 Belgio 19, 47, 79, 137, 177, 178
 Belošević, M. 86, 169
 Benino 216
 Berman, H. 214
 Bernard, J.-C. 82, 134
 Berveling, G. 154
 Bharato 37, 189, 214
 Bianchini, D. 26
 Bibliotekoj 27, 114, 121
 Blanke, D. 57, 91, 99, 102, 148, 198, 208, 213
 Blanke, W. 91
 Blinduloj 48, 135, 188
 Bona Espero 101, 197
 Bonino, E. 81, 183, 207
 Borremans, C. 100, 136, 196
 Bosga, S. 168
 Bosnio-Hercegovino 5, 37, 93, 129, 188
 Bottegoni, D. 48
 Boulton, M. 16, 151
 Bouman, A. k. M. 169
 Braun, F.-J. 206
 Brazilo 26, 38, 47, 58, 64, 65, 71, 101, 105, 119, 137, 171, 197, 198, 201
 Brejnev, L. 54
 Brisebois, R. 127
 Broadribb, D. 72, 189
 Bronstejn, M. 47, 54, 152, 153
 Bulgario 6, 47, 79, 100, 133, 137, 216
 Buller, O. 24, 55, 146, 160, 182
 Burkert, M. 16
 Caragea, N. 196
 Carravieri, G. 27
 Castro, Familio de 153
 Centra Oficejo de UEA 18, 182
 Centro de Esploro kaj Dokumentado 81, 114, 213
 Chavignon, P. 26, 65, 112
 Chen Shide (Zensto) 140

Choe Tae-sok 127
 Cibulevskij, D. 52, 196
 Corsetti, R. 19, 99, 134, 162, 178, 192, 201
 Cseh, A.; Cseh-metodo 41, 86, 87
 Csizsár E., N. k. P. 192
 Csizsár N. 13
 Cvetkova, B. 5, 166
 Ĉapelilo 205
 Ĉeĥio 13, 37, 38, 58, 79, 81, 99, 170, 190
 Ĉinio 9, 37, 66, 79, 98, 106, 168, 176, 197, 216, 217
 Dalla, V. 42
 Dang Dinh Dam 47
 Danio 78, 81, 138
 Danvy, J.-P. 173
 Daŝgupto, P. 214
 Davies, S. 126
 Dazzini, C. 27
 Dek, L. 156
 Delegitoj 107, 198, 207
 Diego, F. de 54, 61-63, 97, 110
 Diego, O. de 110
 Djikoune, E. 169
 Dogsuren C. 67, 98
 Drajev, K. 180
 Drezén, E. 213
 Duc Goninaz, M. 209
 Ducrocq, J. 136
 Dziegielewska, J. 47, 79
 Ebury Bordo 8
 Eco, U. 36
 Einstein, A. 29
 Ekologio 7, 105, 184
 Ekspozicioj 18, 26, 38, 77, 118, 137, 197, 216
 Eksteraj rilatoj 4, 78, 88, 110, 183, 207, 208
 Ekumenismo 198
 Ekzamenoj de ILEI/UEA 81, 86, 112, 113, 169
 Encanto da Terra vd. Castro, Familio de Erasmus, H. 81, 207
 Ernst, E. 166
 Ertl I. 14, 70, 81, 152, 154, 156, 157, 182, 212
 Esperantologio 45, 91
 Estonio 37, 38, 76
 Estrara Raporto 107-116
 Estraro de UEA 81, 146, 181-183
 Etnismo 7, 99, 118
 Etnografio 57
 Eŭropa agado 2, 42, 81, 102, 111, 126, 177, 183, 185
 Eŭropo 5, 44, 68, 104, 112, 128
 Fajski K. 59, 118
 Fakaj asocioj 12, 48, 81, 114, 206, 207
 Fantom, I. 69, 137
 Fedorov, A. 71
 Fervojistoj 12, 37, 170, 217
 Fettes, M. 14, 30, 53, 81, 88, 146, 148, 158, 181, 183, 198, 207
 Fighiera, G.C. 56
 Filatelo 68, 78, 79, 99, 159, 160
 Filologoj 81
 Financo de UEA 81, 108, 115-116, 147, 182
 Finnlando 10, 21-25, 58, 69, 89, 106, 141-160, 169, 176, 188, 201, 214
 Fischer, G. 101
 Fischer, R. 101
 Foliume 16, 56, 71, 135, 175, 195, 215
 Fondajoj kaj kontoj 109, 210
 Carson 134
 Grabowski 11
 Socio kaj Esperanto 133
 Forsman, L. 48
 Forumo 52, 96
 Fotografio 118
 Francio 19, 33, 37, 38, 58, 71, 77, 78, 98, 99, 118, 119, 126, 173, 175, 176, 177, 199, 201, 216, 217
 Fried, A.H. 29
 Fundapax-projekto 85
 Gaines, D. 154, 156
 Gaitán, J.D. 64
 Gällmo, G. 29, 69

Gama, L. 26
 Ganao 8, 41
 García Fumero, A. 156
 Beglo K. 193
 Gentile, G. 36
 Germanio 19, 38, 42, 47, 57, 58, 79, 88, 99, 118, 138, 139, 176, 198
 Geus, F. de 146, 181
 Ghimire, B. 104
 Gibczyńska, J. 154
 Giessner, J. 36, 166
 Giorgi, A. de' 11
 Girolametti, M. 65
 Glossop, R.J. 214
 Goraliski, A. 166
 Gotoo H. 138
 Grant, J. 60
 Grattapaglia, G. kaj U. 101, 148
 Greatrex, G. 31, 150, 182
 Gregor, D.B. 120, 200
 Grimley Evans, E. 53, 97, 172
 Grop, A. 154
 Grosjean, Marion 150, 168
 Grosjean, Mireille 7, 57, 59
 Grossman, R.F. 78
 Groth, M. 124
 Gvatemalo 26
 Gudskov, N. 133
 Gulyás I. 12
 Gunther, W. 96
 Haaf, D. ten 150, 178, 184
 Häkli, L. 160
 Han Moo-hyup 166
 Handikapuloj 78, 101
 Hanke, A. 196
 Harry, R. 150
 Hartridge, L. 33
 Hasala, V. 79
 Hauptenthal, R. 192, 194, 196, 211
 Hernández Llusera, V. 28, 69, 97
 Hinda Unio vd. Bharato
 Hispanio 47, 85, 118, 119, 147, 180
 Historio 21, 22, 29, 67, 82, 142, 194
 Homaj rajtoj 99
 Honora Patrona Komitato 145, 165
 Honoraj Membroj 145, 166
 Hueting, I. 189
 Hungario 4, 37, 38, 71, 77, 82, 86, 100, 106, 118, 122, 138, 170, 177, 197, 201
 Ĥejr-Hah, R. 73
 Idzerda, S. 106, 150, 168
 Informado 37, 39, 42, 57, 68, 70, 77, 78, 88, 98, 111, 118, 138, 158, 198, 201
 Institucio Hodler 109
 Instruado, edukado 18, 27, 48, 57, 67, 77, 78, 81, 85-87, 88, 96, 99, 101, 105, 113, 119, 138, 158, 159, 169, 197, 199, 217
 Interlingvistiko 57, 99, 127, 148, 198, 213, 217
 Internacia Kongresa Universitato 150, 164
 Intervjuoj 2, 42, 61, 64, 149, 188
 Irano 9
 Irlando 201
 Islando 37, 199
 Israelo 77
 Italio 18, 19, 27, 42, 47, 48, 57, 77, 85, 98, 99, 105, 118, 138, 139, 197, 198, 201, 209, 217
 Itó K. 91, 194
 Jackson, A. 36
 Jackson, M. 13, 130
 Japanio 7, 18, 27, 37, 47, 57, 58, 66, 67, 77, 99, 119, 138, 198, 209, 216
 Jarlibro 86, 108
 Jegorovas, P. 146, 181
 Johano Paŭlo la 2-a 37
 Jong, R. de 193
 Jugoslavio 18, 37, 57, 119
 Junularo 13, 31, 88, 99, 106, 118, 150, 168, 184, 210
 Ĵurnalismo 71, 78, 159
 Kajto 33, 139, 153
 Kalendaro 49, 130, 187
 Kamačo, G. 25, 69, 156

Kamboĝo 138
 Kamphausen, A. 41
 Kanado 81, 127
 Katalunio 38, 98, 147, 199, 216
 Katolismo 18, 37, 45, 170
 Kervers, E. 79
 Kilby, K. 159
 Klatt, M. 36
 Kniivilä, K. 22, 82, 158, 212
 Kobayashi, T. 77, 151
 Kohl, H. 138, 176
 Kolombio 26, 39, 65
 Komerco 37, 71, 137, 138, 206
 Komitato de UEA 146, 147
 Komputado 202-205
 Kongresa temo 30, 148, 150
 Kongresoj, renkontigoj
 3-a Afrika 8, 41
 4-a Afrika 41, 125
 3-a Amerika 171
 31-aj Baltiaj E-Tagoj 198
 6-a Bharata 189
 31-a Brazilo 171
 45-a de Bulgara E-Asocio 6
 3-a Ĉina 217
 11-a Ekumena 198
 2-a Eŭropa E-Unia 126
 47-a IFEU-Kongreso 170
 48-a IKUE-Kongreso 170
 29-a ILEI-Kongreso 169
 61-a Internacia de Blindaj E-istoj 188
 Internacia E-Kongreso 189
 11-a Internacia Festivalo 58
 51-a Internacia Junulara 168
 19-a Internacia Junulara Festivalo 58
 14-a Internacia Literatura Forumo 198
 38-a Internacia Seminario de GEJ 58
 82-a Japana 209
 14-a Komuna Seminario 168
 26-a Pola 77
 Rusia 44
 79-a Universala 110
 80-a Universala 10, 89, 141-160
 81-a Universala 110, 190
 82-a Universala 110
 Konisi G. 138
 Konkursoj 57, 78, 118, 197
 vd. ankaŭ Belartaj Konkursoj
 Konsilio de Eŭropo 2, 4, 81, 111
 Koreio 66, 67, 98, 118, 127, 157, 201
 Koresponda Servo Mondskala 177
 Korjenkov, A. 11, 44, 209
 Kostariko 26, 64, 171
 Koszulak, J. 213
 Kotizoj 35, 81, 178
 Kouchner, B. 177
 Koutny I. 99, 177, 208
 Krause, E.-D. 173
 Kroatio 5, 47, 77, 78, 81, 128, 197, 201, 215
 Kubo 19, 39, 64, 98, 197
 Kuiterman, N. 104
 Kulturo 11, 24, 27, 57, 113, 121, 138, 152-156, 162
 Künzli, A. 127, 148, 213
 Kurisu K. 156
 Laaksonen, J. 21, 145
 Labasthe, G. 19
 Langlet, V. k. N. 82-84, 196
 Lapenna, B. 189, 196
 Lapenna, I. 137, 142, 189
 Laste aperis 15, 34, 75, 93, 117, 135, 155, 174, 195, 215
 La Torre, M. 85, 99, 150, 205
 Latvio 5, 38
 Ledon, G. 16, 65, 148
 Lee Chong-yeong 27, 66, 127, 149, 160, 182, 207
 Lehtivaara, O. 120
 Leoni de León, A. 64, 171, 215
 Le Puil, J. 152, 153, 173
 Leser, J. 20
 Libroj
 Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius 134
 Aktoj de Internacia Scienca Simpozio "Esperanto 100-jara" 53
 Amkantoj 212
 Arbo ... kiu forkuris, La 16
 Ariadna fadeno 213
 Asteriks, la gladiatoro 128

- Bakin kaj Esperanto 195
Being colloquial in Esperanto 73
Blankaj aŭtoroj 133
Blankaj mamoj de Bosilka 133
Buŝo plena je tero 133
 Cent jaroj da soleco 54
Comprehensive English-Esperanto dictionary 172
Ĉinaj klasikaj poemoj ilustritaj 14
Ĉu vi aŭdis, ke... 193
Deklingva manlibro pri politiko 132
Denaska dulingveco 192
 Dictionar esperanto-román 173
Dulingve - pli simple 192
 Elementa Gramatiko de E-o 16
 Enkonduko: Historio de Japanio kaj Koreio 67
 Esperanto explicado, El 16
Eterna domo 133
Familio Talbe 132
 Ghirlanda poetica 71
Glozel kaj la prahistoria skribo 192
 Gramatiko de Esperanto 16
 Granda vortaro hispana-Esperanta 61
Grand Dictionnaire Français-Espéranto 173
Hanako lernas Esperanton 73
Historio de la mondolingo 213
L'homme qui a défié Babel 175
 Hriday Ganga 16
 In memoriam Dr. Kalocsay Kálmán 16
Interrilatoj 193
Kaj la sumo haltis 192
Kaj ni solas 14
 Kaoso en Budapeŝto 82, 134
Kastelo de la rozo 133
 Kompaktwörterbuch Esperanto 135
Kompreni 32
Komputika leksikono 204, 205
 Krimo kaj puno 55
 Kroatisches Kriegsnachtbuch 56
Language as Barrier and Bridge 213
 Looking at Language 16
 Ludovikologia dokumentaro 194
 Maŝinelementoj 16
 Mondo das máquinas, O 71
 Ne tiel sed ĉi tiel 77
Nevidbla rivero 133
Nokto de parolo 133
 Nova realismo, La 16
 Oni ne pafas en Jamburg 54
 Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko 87
Plessis-Bourré kaj alhemio, Le 192
Poemoj de Armand Su 74
Raviĝoj 133
Respubliko, La 72
 Retoriko 137, 196
Silka kuseno 32
Tagmeza ŝongo 133
Tetremoj — ĉu enigmo? 53
Tradukarto 132
Unumane 32
Unuminutaj noveloj 212
Verso (Rudaki) 14
 Vivi sur barko 134, 193
Vojaĝoj kaj aliaj poemoj 74
 Zamenhof, aŭtoro de Esperanto 16
 Libroscienco 194
 Libroservo 55, 108, 174
 Lima, T.J. de 156
 Lindstedt, J. 145, 150
 Lingvo 17, 28, 36, 54, 69, 97, 214
 Lingvopolitiko 2, 4, 42, 99, 102, 118, 126, 127, 148, 162, 177, 185
 Lins, U. 5, 11, 81, 112, 121, 160
 Lipari, M. 27, 146, 181, 201, 207
 Literatura 37, 56, 61, 78, 99, 118, 122-124, 151, 167, 198, 211
 Litovio 18, 104, 198
 Liu Xiaojun 52, 67
 Löwenstein, A. 73, 178
 Lucchetta, G. 129
 Ludovikito 91, 194
 Ludwig, E. 129
 Lutermano, V. 69
 Łuczyno, M. 101
- Mac**
 MacAoidh, G. 36
 MacGill, S. 78, 86, 156
 Madagaskaro 98, 216
 Maitzen, H.-M. 53, 89, 150
 Mak, B. 168
 Malacion, A. 105
 Manau Torres, R. 28, 97
 Manero, A. 152
 Manson, J.J. 167
 Mantaud, L. 69
 Mao Zifu 156
- Mařik, J.** 58, 170
 Marimon, J. 180
 Martorell, F. 129
 Masaĝo 19, 45, 79, 197
 Masala, B. 94, 129, 189
 Masson, H. 99, 175
 Matematiko 58
 Máthé A. 71
 Matland, E. 214
 Matthias, U. 69
 Mayer, H. 53, 193
 Mazi 117, 159
 Mazodze, O. 98
 Mechelynyck, A.J. 150
 Medicino 37, 216
 Medvedev, L. 7, 176
 Meksiko 26, 201
 Melnikov, A. 33
 Membraro de UEA 46
 Merkatiko 57
 Mezini, B. 68
 Miela, P. 152, 153
 Milojević, S. 182
 Minnaja, C. 209
 Minoritatoj 106
 Mirzabajev G. 67, 77, 152
 Miyoshi, E. 157
 Mizuno Y. 16, 47
 Moerbeek, N. 188
 Moinhos Pardavila, J. 19
 Mongolio 98
 Moon, B. 185
 Mulder, J. de 150, 168, 210
 Muzeoj 18, 78, 99, 216
 Muzikajoj
Laŭ lula ondo 33
Por vidi la mondon 33
Procesio multkolora 33
Tohuwabohuo 33
 Vojo, La 28
 Muziko 11, 13, 28, 99, 130, 139, 152-154, 198
- N**
 Naturamikoj 199
 Naturismo 19
 Neave, A. 134
 Nelderland 18, 19, 47, 70, 79, 81, 99, 138, 169
 Nekrologoj 20, 40, 60, 80, 120, 140, 167, 179, 180, 200, 218
 Németh J. 81, 86
 Nepalo 9, 104
 Neregistraj organizoj 4, 183
 Neves, G. 32, 138, 156
 Nigero 8, 77, 79, 198
 Nikaragvo 26, 64
 Nisi Y. 17
 Nisio T. 67
 Nitobe I. 182
 Nobel-premiitoj 29, 69
 Norvegio 18, 38, 77, 138, 198
 Novikov, A. k. G. 48
 Novobilsky, V. 79
- O**
 Oliveira Santos, D. 26
 Oneř, I. 78, 173
 Oomoto 27
 Oořida T. 168
 Orellana Rojas, A. 8, 27, 41, 86, 112, 158
 O' Riain, S. 192
 Oshó-Davies O. 136
 OSIEK 147
- P**
 Pagliarini, R. 200
 Pakistano 9, 77
 Pasporta Servo 184
 Perevertajlo, E.S. 196
 Persone 154
 Petik J. 96
 Pettyn, A. 6, 87, 132
 Pfeiffer, D. 150
 Pić, K. 167, 211
 Piedpilko 105
 Pietiläinen, J. 159, 160
 Pilger, W. 17, 32, 70, 132, 137
 Pokrovskij, S. 138, 204, 205
 Politiko 36, 69, 99, 132, 177, 196
 Pollando 6, 37, 47, 77, 78, 79, 99, 132, 138, 189, 198
 Popov, M. 20
 Portugalio 77
 Power, C. 88, 144
 Premioj
 Deguchi 157, 161
 Trofeo Fyne 157
 Zamenhof 145
 Princz O. 4
 Pyhala, R. 214
- R**
 Rabevazaha, D. 98
 Radikala Partio 69, 81, 105, 118, 177
 Radio 6, 18, 37, 66, 78, 94-95, 106, 128-129, 159, 160, 186, 199, 217
 Rados P.A. 212
 Ragnarsson, B. 199
 Raola, O. 19
 Rapley, J. 126, 137, 214
 Rasismo 79
 Rašić, N. 90, 133
 Rátkai A. 56
 Reagoj 17, 36, 56, 69, 97, 136, 196, 214
 Recenzoj 14, 32, 53, 72, 132, 172, 192, 212
 Reinvar, J. 208
 Resende, R. 69
 Resulović, M. 129
 Revuoj
 Armenio 197
 Avanco 98
 Brazila Esperantisto 65, 171
 Brazila Heroldo 112
 Brita Esperantisto, La 16, 78
 Bukureŝta Informilo 45
 Cirkulaĵo por esperantlingvaj paroj kaj familioj 178
 Dua Jarcento, La 68, 71
 El Popola Ĉinio 160, 176
 Esperantisto Slovaka 68
 Esperanto 69, 78, 81, 110
 Espero, La 39
 Espero el Koreio, La 66
 Espero Katolika 16
 Eŭropa Poezio en Esperanto 56
 Facila Esperanto 9
 Influo 182
 Informilo por Interlingvistoj 114
 Internacia Fervojisto 12, 170
 Internacia Pedagogia Revuo 81, 135
 Juna Amiko 135, 215
 Junulara Magazino Togolanda 77
 Kontakto 111
 Lanterno Azia, La 66
 Liberecana Ligilo 16
 Literatura Foiro 78
 Litova Stelo 104, 196
 Magdeburga Folio 195
 Medicina Informilo 79
 Medicina Internacia Revuo 16
 Merkato, La 206
 Migranto, La 199
 Monato 78, 206
 Norda Prismo 122-124
 Paco 215
 PANORAMO-Info 195
 Penseo 11
 Periodaĵoj 71
 Puraj Pulmoj 139
 Rok-Gazet' 11
 Ruslanda Esperantisto 195
 Saksa Kuriero 195
 Stalina Vero 215
 Survoje 71
 Tradukisto, La 56
 Tutmondaj Scienco kaj Tekniko 11, 195
 Vekilo Kongresa 159
 Voĉo el Turingujo 195
 Rezende Piton, J. 26, 150, 168
 Ritamäki, A. 31, 150
 Rizvanović, S. 188
 Rolland, R. 29
 Röllinger, H. 139, 167
 Rössler, F.-G. 33
 Rotario 206
 Rulofido, P. 134
 Rumanio 37, 45, 78, 79, 85, 147, 173, 217
 Rusio 5, 19, 38, 39, 44, 54, 71, 81, 118, 138, 168, 176, 208
 Ruyschaert, A. 150
- S**
 Sadler, M. 156
 Sæmundsson, H. 37, 56
 Saionji M. Vd. Masaĝo
 Salam, A. 189
 Samseksamo 160
 Sano 79, 139
 Schenk Ledon, S. 65
 Schicke, H. 209
 Scienco 45, 79, 114, 139, 207
 Seabra, M. de 192
 Sekelj, T. 7, 57
 Seko, A. 76
 Selten, R. 29, 37, 69, 139, 165
 Sennaciismo 177
 Serbio vd. Jugoslavio
 Sikosek, M. 36
 Silber, G. 7, 57
- Sindikatoj** 79
 Sinno, T. 9, 69
 Skoltismo 100, 169
 Sloper, M. 153
 Slovakia 7, 57, 68, 71, 81, 137, 176, 208
 Slovenio 177
 Smidliusz K. 77, 86, 87, 193
 So Ĝilsu 81, 112
 Sociala laboro 160
 Societo Zamenhof 107
 Sociologio 90-92
 Solidareco 19, 58
 Spirat, H. 179
 Sporto 100, 105
 Ståhlberg, S. 14, 74
 Starck, J. 189
 Steele, T. 54, 105
 Stenografio 160
 Stryhn Meyer, J. 118, 150
 Su, A. 74
 Svane, E. 214
 Svedio 39, 82, 122
 Svensson, G. 196
 Svislando 7, 18, 57, 70, 71, 127
 Symoens, E. 178
 Szász L. 78, 136
 Szilágyi F. 122-124
- Ŝ**
 Ŝako 100
 Ŝalomon, A. 214
 Ŝivarov, A. 32
 Ŝtimec, S. 5, 27, 56, 128
- T**
 Tanzanio 119, 125
 Taoismo 65
 Tarschys, D. 2
 Teatro 100, 118, 152, 154
 TEJO vd. Junularo
 Televido 77, 118
 Terminologio 17, 114, 132, 199, 204, 205
 Terziev, D. 152, 153
 Thierry, J. 140
 Thomson, D. 126, 205
 Thorsen, P. 122-124
 Tófalvi E. 156
 Togolanda 77, 98, 147, 198
 Tokarev, B. 20
 Tonkin, H. 127, 145, 148, 165, 213
 Tradukado 58, 61, 77, 118, 132
 Trafiko 37
 Triolle, R. 146, 181, 201
 Tuinder, J. 101
 Tvarožek, E.V. 167
- U**
 Uĉida M. 69
 Ukrainio 47, 71, 105, 216
 Unesko 78, 88, 110, 144, 162, 183, 207
 Ungar, K. 156
 Universitatoj 27, 85, 88, 100, 177, 217
 Unuigintaj Nacioj 30, 31, 81, 86, 110, 127, 150
 Usakiewicz, W. 99, 132
 Usono 27, 38, 47, 98, 99, 100, 127, 138, 172, 175, 176, 201
 Usui R. 66, 97
 Uzbekio 77
- V**
 Valén, A. 61-63, 208
 Venezuelo 217
 Verkistoj 160
 Verloren van Themaat, W. 74, 99, 136
 Vdbrendon 27, 77, 87, 159
 Villasmil, D. 61
 Virinaj aferoj 79, 217
 Vitali, D. 42
 Vjetnamio 47, 209
 Vlk, M. 170
 Vogelmann, B. 16, 206
 Vortaroj 61, 172-173, 208
- W**
 Wandel, A. 89, 146, 150, 181, 207
 Wearing, M. 36
 Weichert, M. 202
 Wells, J. 1, 27, 81, 142, 144, 145, 217
 Wennergren, B. 87, 151, 154
 Wilson, J. 79
 Wüster, E. 199
- Y**
 Yamasaki S. 17, 97, 150, 214
- Z**
 Zaleski-Zamenhof, L.C. 146
 Zecchin, A. 69
 ZEO-j 119, 160
 Ziegler, S. 19
 Zilah, E. de 72, 189, 193
 Zimbabvo 98

Jen okazo por ekkolekti aŭ kompletigi la epokfaran Zamenhofan libroserion de ludovikito:

Rabato ekde 10 volumoj!

Parto unua – originalaro: Unuaj libroj por esperantistoj, p. 160, gld. 48; La inkunabloj de Esperanto, p. 283, gld. 39; Ni laboru kaj esperu!, p. 324, gld. 39; Antaŭen al la laboro!, p. 344, gld. 39; Tamen la afero progresas!, p. 414, gld. 39; Hebreo el la geto, p. 455, gld. 48; Kun gradaj paŝoj eksterlanden!, p. 427, gld. 39; La franca periodo de Esperanto, p. 229, gld. 48; Klopodis organizi, sed vane!, p. 446, gld. 39; La neforgeseblaj kongresoj, p. 303, gld. 48; Por kaj kontraŭ reformoj!, p. 383, gld. 39; Mortinta, sed senmorta!, p. 518, gld. 39; Konfliktoj inter esperantistoj, p. 451, gld. 48; Postrikolto de ludovikaĵoj, p. 307, gld. 48; Milito ĉion detruas!, p. 442, gld. 48.

Parto dua – tradukaĵoj: De Patronia al Ŝekspir', p. 455, gld. 48; De Mickiewicz al Goethe, p. 499, gld. 48; De Molière al Ŝalom-Alejhem, p. 499, gld. 48; Fabeloj de Andersen, p. 822, gld. 165.

Parto tria – kromkajeroj: Senlegenda biografio de L. L. Zamenhof, p. 303, gld. 37,50; Korespondaĵo ludovikologia, p. 273, gld. 37,50; Post la iel-tiela kompletigo, p. 296, gld. 37,50; Ludovikologiaj biografietoj, p. 335, gld. 37,50; Aŭtografoj de Ludoviko, p. 408, gld. 48; Ludovikaj vortaroj el la 19a jarcento, p. 374, gld. 48; Leteroj de Sebert al Ludoviko, p. 280, gld. 48; Kial Ludoviko abdikis?, p. 278, gld. 48; Lingvaj respondoj de Ludoviko, p. 144, gld. 39; Ermitoj kuncelebris la majstron, p. 321, gld. 57.

Konciza originalaro de Zamenhof: Unua etapo de Esperanto, p. 948, gld. 120; Ĝis la homaranismo, p. 1040, gld. 120; Destino de Ludovika dinastio, p. 1002, gld. 120.

Ludovikologia dokumentaro. Aperis 14 volumoj: I Unuaj libroj, p. 487; II Komenctempaj lernolibroj 1, p. 365; III Komenctempaj lernolibroj 2, p. 451; IV Poŝaj lernolibroj, p. 617; V Diversaj vortaroj kaj lernolibroj, p. 533; VI Diverslingvaj broŝuroj, p. 499; VII Legolibroj I, p. 563; VIII Legolibroj II, p. 637; IX Adresaroj I, p. 367; XI Lingvo Internacia I, p. 463; XII Lingvo Internacia II, p. 493; XVI Spikumaĵoj I, p. 515; XVII Spikumaĵoj II, p. 537; XIX Ludoviko kaj la inkunabloj, p. 215. Ĉiu volumo en ĉi tiu sekcio kostas po 57 gld. escepte de XVII (72 gld.).

Ĉi tiu monumenta verkaro de Zamenhof aperis en limigita eldonkvanto kaj post kelkaj jaroj ĝi ne plu estos havebla. Fakte, jam kvar volumoj (nemenciitaj ĉi tie) elĉerpigis. Kaptu la okazon! Havigu al vi la plej zorge preparitan kaj la plej luksan libroserion en la historio de Esperanto. Se vi mendos en unu fojo minimume 10 diversajn volumojn, ni ne fakturos al vi la sendokostojn, kaj vi tiel ŝparas 10%. Se vi mendas la tutan kolekton de 46 volumoj, vi rajtas pagi la sumon (2 568 gld.) en kvin egalaj partoj ene de unu jaro,

Oferto valida ĝis la 31-a de januaro 1996.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA!



eldonejo ludovikito

“Esperanto kaj la rilatoj Nordo-Sudo en Ameriko”

AMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO

12 – 17 februaro 1996

en la Universitato de Kostariko en San José.

Prelegoj, Cseh-seminario A, ekzamenoj de UEA/ILEI, kunsidoj, ekspozicio, ekskursoj.

Pliaj informoj: Antonio Leoni de León,
Apartado 7603-1000, San José, Kostariko.

☎ +506-231 41 67; ✉ jleoni@cariari.ucr.ac.cr

Sanigas nekuraceblajn malsanojn, bonigas farton,
donas energion, natura kaj facile lernebla

YUMEIHO-TERAPIO

Orienta Speciala Diina Masaĝo

Koksoston Ĝustiga Premkneda Terapio
de profesia terapiisto Masayuki Saionji.

Dua eldono, reviziita kaj grandigita, riĉe ilustrita.

Prezo 21,00 gld. (rabato 33% por min. 3 ekz.).

Mendebla ĉe la Libroservo de UEA.

Videobendon en diversaj sistemoj (en Esperanto kaj aliaj lingvoj) mendu por 80 gld. ĉe:

Internacia Instituto de Preventa Medicina Praktiko,
CPO Box 405, Tokyo, 100-91, Japanujo.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KŬI TAKTO estas gazeto por ĉiu, kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KŬI TAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1996 **KŬI TAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1996

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	125 frankoj	Nederlando	41 guldenoj
Aŭstrio	245 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	765 frankoj	Hispanio	2300 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	32 guldenoj	Portugalio	2500 eskudoj
Britio	16 pundoj	Italio	34000 liroj	Svedio	185 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	31 dolaroj	Usono	23 dolaroj

Granda rabato por grupaj abonoj ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!

Kiel argumenti? Per faktoj. Kie trovi ilin? Ĉe CED!

En Esperanto, nemalhaveblaj konsultiloj:

Bibliografio de disertacioj pri E-o kaj interlingvistiko	159 p.	21,00
Suplemento	63 p.	7,20
Lingvistikaj aspektoj de Esperanto	76 p.	15,00

En aliaj lingvoj, elstaraj studoj: (kun resumoj en Esperanto)

The Economics of Language Use	164 p.	22,50
Language as Barrier and Bridge (vd. p. 213)	141 p.	42,00
Language Behavior in International Organizations	155 p.	24,00
Language in Religion	141 p.	42,00
The Language Problem in International Relations	12 p.	2,10
Overcoming Language Barriers: The Human-Machine Relationship	112 p.	22,50

Ĉiuj prezoj estas en guldenoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.



KULTURA ESPERANTO-DOMO
GRÉSILLON – F-49150 BAUGÉ
telefono : 41 89 10 34

Ĝenerala Programo por 1996

- 13/04–20/04 Internacia infan-renkonto
- 20/06–06/07 Kursoj por komencantoj kaj lertuloj
- 07/07–13/07 Kursoj por komencantoj (1-a parto) kaj praktikantoj
Preparado al la Atesto pri Kapableco (ekzameno de Franca Esperanto-Instituto).
Studo de la franca lingvo pere de Esperanto.
- 14/07–21/07 Kursoj por komencantoj (2-a parto), praktikantoj kaj lertuloj
- 21/07–28/07 Kursoj por komencantoj (1-a parto) kaj praktikantoj
“Studado de la gramatiko” (André Cherpillod).
- 28/07–04/08 Kursoj por komencantoj (2-a parto) kaj praktikantoj
“La arto traduki” (Georges Lagrange).
- 04/08–11/08 Kursoj por komencantoj (1-a parto), praktikantoj kaj lertuloj
- 11/08–18/08 Kursoj por komencantoj (2-a parto) kaj praktikantoj
- 18/08–25/08 Kursoj por praktikantoj kaj lertuloj

La Kultura Esperanto-Domo estis fondita en 1951. La kastelo Grésillon staras meze de 18-hektara parko. Tie estas proponataj, ĉiujare, kursoj, prelegoj, distraĵoj, ekskursoj en internacia etoso. La ĉeestantoj disponas bibliotekon kaj libro-servon. Pli detala programo estas havebla kontraŭ respond-kupono aŭ afrankita koverto.

ANONCU EN JARLIBRO 1996!


En la Jarlibro de UEA via anonco pri Esperanto-aranĝoj, libroj, gazetoj k.a. varoj atingos pli vastan publikon ol en iu ajn alia Esperanto-eldonaĵo. Pli ol 7000 aktivaj esperantistoj plurfoje vidos vian reklamon, ĉar la Jarlibron oni konsultas tra la tuta jaro.

Movada prezo Ekstermovada prezo

Kvarona paĝo	120 gld.	240 gld.
Duona paĝo	215 gld.	430 gld.
Tuta paĝo	390 gld.	780 gld.
Kovrilpaĝo	780 gld.	1560 gld.

Se vi varbas ekstermovadan reklamon, ni pagos al vi 30% de la prezo kiel makleraĵon. Anoncmendiloj haveblas en Esperanto, la angla, franca, germana kaj nederlanda. Limdato por la mendoj: 31-a de januaro 1996.

LA PLEJ KONATA LIBRO PRI EFIKA TEMPOUZO, NUN EN ESPERANTO!



Lothar J. Seiwert:

La aboco de tempoplanado

Roterdamo: UEA 1995. Serio *Konsilaroj por Aktivuloj*
n-ro 2. 53 p. Prezo: 7,50 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.